

L.L. Zamenhof kaj la postmilita ordo:
For la gentajn privilegiojn! For la naciismon!

Neŭtralaj landnomoj kiel solvo por la intergenta paco

Rimarkoj pri la „Alvoko al la diplomatoj“ de 1915 de L.L. Zamenhof
kaj konsideroj pri la situacio de la etnaj minoritatoj en la intermilita tempo

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli (Svislando)



En 1915 kelkaj Esperanto-gazetoj aperigis kuriozan tekston, kiun L.L. Zamenhof verkis jam fine de 1914 kaj kiu traktis la temon de la ordo por la paca kunezistado de la gentoj en la postmilita mondo.¹ La teksto estis direktita al la diplomatoj kun alvoko agi respondece koncerne la reorganizadon de la landlimoj en la nova postmilita mondo, kiu devus vivi en paco kaj justeco. Certe, tiu „Alvoko“ enhavis kelkajn kuriozaĵojn kaj fantaziojn tipe zamenhofajn, kiuj mirigas, okulfrapas kaj harhirtigas. La karakterizaĵoj de la teksto, kiu malgraŭ sia strangeco estas sufiĉe interesa kaj konsiderinda ankaŭ 100 jarojn post sia apero, estos analizitaj kaj prikomentitaj en la ĉi-sekva konciza studo, kiu tuŝas la demandojn, problemojn kaj realaĵojn de la tempo post la militfino de 1918 en rilato kun la ideoj, konvinkoj kaj proponoj, kiujn Zamenhof esprimis en sia „Alvoko“. La prikomentado de la hipotezoj de la zamenhofa „Alvoko“ konsideras historiajn, politikajn, jurajn kaj etnismajn aspektojn kaj donos la okazon por pli profunde okupiĝi pri la situacio de la etnaj malplimultoj en elektitaj landoj de orienta Eŭropo inter 1917/18 kaj 1939, la jaro de la eksplodo de la dua mondmilito. En tiu senco la studo celas, kiel dirite, rilatigi la zamenhofan „Alvokon al la diplomatoj“ kun la politika evoluo ĝenerale kaj la situacio de la etnaj minoritatoj aparte en Eŭropo en la intermilita tempo.

1. Milito kaj paco kaj la rolo kaj tasko de la diplomatoj

L.L. Zamenhof estis bone konscia pri la rolo kaj tasko de la diplomatoj sed ankaŭ pri la sorto de ilia laboro, kaze ke ĝi fiaskos, se li skribis en sia „Alvoko“ de 1915: „Terura milito ekkaptis nun preskaŭ la tutan Eŭropon. Kiam finiĝos la grandamasa reciproka buĉado, kiu tiel forte malhonoras la civilizitan mondon, kunvenos la diplomatoj kaj penos reordigi la rilatojn inter la popoloj.“

¹ En letero al H. Sebert de la 30a de decembro 1914, Zamenhof aldonis tiun tekston kaj petis la francon distribui ĝin inter konatoj. La alvoko aperis en *The British Esperantist* en marto 1915 kun anglalingva versio (<http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e1d&datum=1915&page=56&size=45>) kaj en *Esperanto* (UEA, Hodler) (<http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e0f&datum=1915&page=44&size=45>), en la eldono de la 5a de aprilo 1915.

„Kiam vi kunvenos post la plej ekstermanta milito, kiun iam konis la historio, vi havos antaŭ vi eksterordinare grandan kaj gravan taskon. De vi dependos, ĉu la mondo havu de nun fortikan pacon por tre longa tempo kaj eble por ĉiam, aŭ ĉu ni havu nur kelktempan silenton, kiun baldaŭ denove interrompos diversaj eksplodoj de intergentaj bataloj aŭ eĉ novaj militoj.“

„Pripensu do frutempe kaj tre zorge vian taskon, ĉar nun, kiam por via laboro estas oferitaj multaj centmiloj da homaj vivoj kaj milionoj da tre malfacile akiritaj homaj bonstatoj, vi havos sur vi tre grandan moralan respondecon. Zorgu do, ke via laboro ne estu sencela kaj senfrukta, kaj ke post la fino de viaj laboroj la homaro povu diri: ni ne vane elportis la grandegajn kaj terurajn oferojn.“

Komento: Efektive, la (nova) diplomatio de la intermilita tempo, kiu alfrontis malfacilajn taskojn por solvi, staris sur malstabilaj kaj malcertaj piedoj kaj devis elteni la grandegajn ´centrifugajn´ energiojn inter la fortoj de la paco kaj la fortoj de la milito. Dum la 1920aj kaj 1930aj jaroj sur la politika scenejo aperis novaj ege ambiciaj kaj danĝeraj (t.e. subtaksataj) politikistoj (kiel Hitler en Germanio, Mussolini en Italio kaj Stalin en Sovetunio), kiuj kondukis al nova politika konstelacio kaj preparis novan mondmiliton, kiu definitive eksplodis la 1an de septembro 1939 per la atako de la germana armeo kontraŭ Pollando (sekve: PL), poste per la sovetia okupacio de orienta Pollando fare de la Ruĝa Armeo la 17an de septembro 1939 kaj la 22an de junio 1941 per la invado de la germana armeo en Sovetunion (sekve: SU). La nuntempaj historiistoj konsideras la duan mondmiliton kiel rektan sekvon de la nedigestitaj rezultoj kaj problemoj de la unua mondmilito kaj de la malsukcesoj de la politiko kaj diplomatio dum la intermilita tempo. Do, sen koni la okazaĵojn de tiu intermilita periodo oni ne povas kompreni la kaŭzojn de la eksplodo de la dua mondmilito.

Malgraŭ diversaj klopodoj por pacigi la kontinenton (pri kiuj mi skribos pli sube), jam antaŭ 1939 okazis plej diversaj militaj aktivecoj en Eŭropo, kiuj bone montras la ĝeneralan agresemon sur tiu kontinento, kiu neeviteble kondukis al nova milito. En januaro 1920 Francio decidis la konstruadon de la Maginot-linio, kiu devis fariĝi giganta defendo-sistemo kontraŭ la danĝeraj najbaroj. En 1920 la progreso de la sovetia armeo en okcidenta direkto estis haltigita per la batalo de Varsovio. En 1923 Francio okupadis la Ruhr-teritorion. En 1929 la germana armeo sekrete ekplanis sian rearmadon. En oktobro 1933 Germanio forlasis la LdN. En 1936 en Hispanio komenciĝis la fama interna milito. En 1937 eksplodis la Dua Japan-Ĉina Milito kaj Hitler klarigis al la germana generalaro siajn militajn intencojn kaj celojn (Hossbach-protokolo). En 1938 la germanoj okupadis kaj aneksis Aŭstrion, distranĉis la Sudetan Landon de Ĉeĥoslovakio, al kio en 1939 sekvis la disbatado de la restaĵoj de Ĉeĥio; ili reprenis la Memellandon de Litovio kaj okupadis la urbon Danzig dum la italoj okupadis Albanion kaj atakis Etiopion per venena gaso. La novembraj pogromoj de 1938 kontraŭ la judoj en Germanio enkondukis la senkompatan persekutadon de tiu popolo en Eŭropo fare de la germanaj nacisocialistoj kaj ties komplikoj en praktike ĉiuj landoj, kaj en sia parolado de la 30a de januaro 1939 Hitler anoncis sian intencon „detru la judan rason“ se okazos nova mondmilito. Sed ankaŭ en Azio regis malpaco: La 11an de majo japanaj armeanoj atakis la soldatojn de la „Mongola Revolucia Popolarmeo“ por anonci limajn pretendojn; per tio komenciĝis la japan-sovetia limkonflikto, en kiu la japanoj utiligis biologiajn armilojn. La 23an de majo 1939 Hitler anoncis en sia parolado antaŭ la germanaj armeestroj (Schmundt-protokolo) sian decidon ataki Pollandon, kio efektive okazis la 1an de septembro. Kiel supre menciite, la 17an de septembro 1939 la Ruĝa Armeo enmarŝis en orientan Pollandon kaj okupadis ĝin. En 1940 Germanio okupadis Danlandon kaj Norvegion, Belgion, Luksemburgion, Nederlandon kaj nordan Francion. SU okupadis la baltajn ŝtatojn Litovio, Latvio kaj Estonio. Germanio atakis Anglion el la aero. Kiel dirite, la 22an de junio 1941 komenciĝis la milito inter Germanio kaj Sovetunio. Ktp. Tiuj okazaĵoj estas ĝenerale konataj.

Se ni do aliflanke rigardas la kronologion de la porpacaj klopodoj kaj agadoj de la diplomatio post la unua mondmilito, ni konstatas, ke la diplomatoj kaj politikistoj tamen ne estis tiel pasivaj kaj malsukcesaj kiel oni povus imagi, kvankam iliaj klopodoj staris sur malstabilaj kaj malcertaj piedoj. Por montri tion mi volas menci i vicon de porpacaj iniciatoj, kies ĉefa celo estis la prevento aŭ evito de nova milito kaj kiuj fariĝis integra parto de la internacia diplomatio kaj internacia juro (g. Völkerrecht). Ankoraŭ antaŭ la subskribo de la oficialaj pactraktatoj, la 28an de aprilo 1919 estis fondita la Ligo de Nacioj (sekve: LdN), al kio sekvis,

la 28an de junio, la pactraktato de Versajlo (kontraŭ kiu la germanoj tiel forte protestis kaj kiun Hitler kritikis kaj rifuzis). Post la ratifiko, ĉi tiu traktato ekvalidis la 10an de januaro 1920. Ĉi tiun ĉefverkon, kiu formale ĉesigis la militon, sekvis tuta aro da parizaj traktatoj, kiuj estis subskribitaj de landoj, kiuj perdis la militon, do de Aŭstrio, Bulgario, Hungario kaj de la Otomana Imperio. En marto 1921, la pol-sovetia milito estis finita en la pactraktato de Riga. En la aprila traktato de Rapallo Germanio kaj SU reaktivigis siajn interrompitajn diplomatiajn kaj ekonomiajn rilatojn. Per la traktato de Lokarno de oktobro 1925 (kun validiĝo en septembro 1926), Germanio, Francio kaj Belgio rezignis pri limŝanĝoj, kaj Germanio estis akceptita en la sino de LdN. La grava traktato pri amikeco inter Germanio kaj SU (USSR) estis subskribita la 24an de aprilo 1926 (Berlina Traktato) kiel daŭrigo de la traktato de Rapallo. Alia signifa traktato estis akceptita en aŭgusto 1927: Temas pri la Briand-Kellog-pakto, kiu proskribis la militon kiel instrumenton de la politiko; la subskribintoj de tiu traktato promesis, ke ili pace solvos siajn problemojn. Precipe la ataka (aŭ agresa) milito estis proklamita kiel kontraŭleĝa. Krom Usono, Kanado, Ĉeĥoslovakio, la Germana Regno, Grandbritio, Hindio, Irlando, Italio, Novzelando kaj Sudafriko, la pakton subskribis ankaŭ Pollando, Belgio, Francio kaj Japanio. Ĉi tiu pakto ekvalidis en 1929 kaj estis subskribita aŭ ratifita de entute 62 ŝtatoj. Dum la Briand-Kellogg-Pakto estas konata kiel elstara evento, malpli konata estas, ke ankaŭ en 'oriento' oni entreprenis analogan iniciaton per la t.n. Litvinov-protokolo (aŭ Moskva protokolo), kiu celis en simila senco kiel la Briand-Kellogg-pakto starigi konvencion inter SU, PL, Rumanio, Latvio, Estonio, Litovio kaj Turkio (hodiaŭ ekzistas, precipe en Rusio, tiaj homoj, kiuj vidas Stalinon kiel pacanĝelon). En la t.n. Simson-doktrino de la 7a de januaro 1932 Usono deklaris, ke oni ne agnoskos traktatojn, kiuj kontraŭdiras la Briand-Kellogg-pakton rilate teritoriajn ŝanĝojn per milita perforto. En julio de la sama jaro estis subskribita la grava pol-sovetia traktato pri reciproka neatakado. La 5an de majo 1933 estis ratifita la daŭrigo de la german-sovetia traktato pri amikeco de aprilo 1926. La 17an de majo Hitler prononcis sian faman „pacparoladon“ antaŭ la parlamento. La 2an de septembro 1933 Italio kaj SU subskribis traktaton pri reciproka neatakado, kaj en januaro 1934 sekvis sama traktato inter Germanio kaj Pollando! Iusence kiel pactraktaton oni povas konsideri ankaŭ la pakton inter kelkaj balkanaj ŝtatoj, kiu certigis reciprokajn helpon kaj defendon kontraŭ aliaj ŝtatoj, kiuj atakas la traktintajn landojn, ekzemple Italio kaj Bulgario. Plue, la Romaj Protokoloj de marto 1934 antaŭvidis pacan ekonomian kunlaboradon inter Italio, Aŭstrio kaj Hungario. En septembro de la sama jaro SU aliĝis al LdN. En majo 1935 ankaŭ Ĉeĥoslovakio kaj SU subskribis traktaton pri reciproka helpo. La 21an de majo Hitler konfirmis antaŭ la germana parlamento sian volon respekti la pacon. Laŭ la unua Leĝo pri neŭtraleco de la 31a de aŭgusto en Usono la liverado de armiloj al la kontraŭuloj en kazo de konflikto estis malpermesita. La Olimpiaj Ludoj (vintraj kaj someraj) de 1936, kiuj okazis en Germanio, certe estis alia kontribuo al la paco sed servis ankaŭ al la propagando de la nacisocialisma reĝimo. La 5an de oktobro 1937 la usona prezidento Roosevelt postulis bridi la agresemon de Germanio, Italio kaj Japanio, kaj la 17an de aprilo 1939 li admonis Germanion kaj Italion, ke ili subskribu traktatojn pri reciproka neatakado kun 31 landoj. La 6an de decembro 1938 germanoj kaj francoj subskribis traktaton pri reciproka neatakado. Eĉ Stalin signalis en sia „kaŝtana“ parolado de la 10a de marto 1939 sian pretecon pace komunikadi kun la germanoj. La 31an de majo 1939 la germanoj subskribis kun la danoj traktaton pri reciproka neatakado, kaj la 7an de junio sekvis sama traktato inter Germanio, Estonio kaj Latvio. Kvazaŭ kiel kulmino de tiu serio de subskribado de traktatoj kaj paktoj, kiuj finfine montriĝis trompaj, mensogaj kaj vanaj, formiĝis, la 24an de aŭgusto, la fifama german-sovetia pakto pri reciproka neatakado (nomata ankaŭ Hitler-Stalin-pakto), kiu enhavis sekretan aldonan protokolon pri la disdivido de orienta Eŭropo laŭ influ-zonoj (aŭ interes-sferoj), kio praktike signifis la okupadon de la baltaj ŝtatoj kaj la (kvaran) disdividon de PL kaj aliaj landoj inter Germanio kaj SU. La supre menciita pol-sovetia traktato pri reciproka neatakado estis rompita de Stalin en la 17a de septembro 1939, kio liberigis al SU la vojon al la okupacio de orienta PL.

Konklude: Dum Usono iel klopodis konservi la pacon, Germanio, Italio, Japanio kaj ties aliancanoj plus SU kaj Ĉinio gvidis milit-agreseman politikon en tiu tempo.

2. Redesegnado de la eŭropa mapo kaj naskiĝo de novaj naci-ŝtatoj en orienta Eŭropo

Ŝajnas ke Zamenhof ne povis imagi aŭ antaŭvidi la naskiĝon de novaj naci-ŝtatoj de malgrandaj popoloj, en kiuj la rajtoj de etnaj minoritatoj estas pli malpli garantiitaj, se li skribis: „Ĉu vi komencos simple refaradi

kaj flikadi la karton de Eŭropo? Ĉu vi simple decidis, ke la terpeco A devas aparteni al la gento X kaj la terpeco B al la gento Y? Estas vero, ke tian laboron vi devos fari; sed ĝi devas esti nur negrava parto de viaj laboroj; gardu vin, ke la refarado de la karto ne fariĝu la tuta esenco de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj, kaj la grandegaj sangaj oferoj, kiujn la homaro elportis, restus vanaj. Kiom ajn vi volos kontentigi la popolojn, kiom ajn justaj vi penos esti kontraŭ diversaj gentoj, vi nenion atingos per refarado de la karto, ĉar ĉiu ŝajna justeco koncerne unu genton estos samtempe maljusteco koncerne alian genton.

Komento:

Post la fino de la unua mondmilito, kiu estis nomata „Granda milito“, kaj la disfalo de la malnovaj grandpotencoj (Ruslanda Imperio, Germana Regno, Aŭstra-Hungara Regno kaj Otomana Imperio) estis kreita tuta aro da naciaj ŝtatoj de Baltio ĝis Balkanio kun demokrati-liberalisma konstitucio kiel kontraŭa modelo al la politikaj konceptoj de la komunisma Ruslando, kiu enkondukis propran ordon, kaj al la reviziisma Germanio, kiu rifuzis la Versajlan ordon. Post la fondo de la Ruslanda Respubliko jam en 1917, Kiel novaj sendependaj respublikoj estis proklamitaj kaj fonditaj en 1918 Finnlando, Estonio, Latvio, Litovio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Aŭstrio kaj Jugoslavio. Rumanio sendependiĝis jam en 1877, Bulgario en 1878/1908, Albanio en 1912 kaj Grekio en 1830.

La nova internacia sistemo de la pactraktataro de Versajlo (1919/20) baziĝis sur la „14 punktoj“, kiuj estis proponitaj de la usona prezidento Vilsono. La ampleksa minoritat-protektado, kiu estis ellaborita surbaze de la parizaj pactraktatoj, la pactraktato de Riga kaj la Ĝeneva Konvencio formis la integran parton de tiu nova postmilita ordo en orienta kaj sudorienta Eŭropo, kiun LdN devis garantii.

Esence estis subskribitaj jenaj pactraktatoj, kiuj reguligis la protekton de la etnaj minoritatoj en la koncernitaj ŝtatoj:

- Konvencio inter Aŭstrio kaj Ĉeĥoslovakio de 1920;
- Konvencio inter Pollando kaj Libera Urbo Danzig de 1920;
- Pactraktato de Dorpat kun konvencio inter Finnlando kaj Sovetunio rilate la finnlingvan loĝantaron en orienta Karelio de 1920;
- Traktato inter Finnlando kaj Svedio rilate la svedlingvajn Åland-insulojn de 1921;
- German-pola konvencio pri Supera Silezio de 1922;
- Traktato de Sèvres de 1920 pri la protekto de la minoritatoj en Grekio;
- Traktato de Lausanne de 1923 pri la protekto de la minoritatoj en Turkio;
- Interkonsento inter Litova kaj la venkintaj potencoj okaze de la enkadrigo de la Memellando en la litovan ŝtaton.

La ĉefaj eroj de tiu minoritat-protektado ampleksis en la teorio la garantiojn pri la utiligo de la propra lingvo kaj praktikado de la religio, ke tiuj malplimultoj povas mem organizi sin, ke ili ne rajtas esti diskriminacitaj kaj ke ili ricevas siajn rajtojn sur la kampoj de la lernejo, instruado, edukado kaj politika partopreno. Laŭ tio, ĉiu popolo devis ricevi sian propran nacian ŝtaton laŭ lingva-etnografia kriterio. Al iuj orienteŭropanoj, kiuj formis la „titolan“ nacion en sia nova ŝtato kaj kiuj antaŭe mem estis subpremataj de rusoj, germanoj, aŭstroj, turkoj ktp., ne plaĉis, ke ili devis respekti tiujn packonvenciojn kaj doni tiujn rajtojn ankoraŭ al aliaj etnaj minoritatoj, kiuj vivis en ilia ŝtato (dum por la okcidentaj potencoj tiuj reguloj ne validis). Ŝajnas ke pli taŭga kaj konvinka modelo por la orienteŭropaj popoloj ne povis esti trovita, ĉar estis preskaŭ neeble atingi por ĉiuj popolgrupoj same kontentigan solvon. La okcidentanoj celis krei „ŝtat-civitajn naciojn“, en kiuj la etnaj partikularismoj ne plu devis ludi rolon kaj specialaj kolektivaj rajtoj devis fariĝi superflujaj. Certe, kun la kvazaŭ trudita minoritat-protektado estis ligita ankaŭ la politiko de la asimilado kiel rimedo por atingi la finan celon, sed pri tio oni ne parolis. Dum en la okcidenteŭropaj landoj (Francio, Germanio, Italio, Britio, Skandinavio) preskaŭ ĉiuj etnaj minoritatoj asimiliĝis (tiel ke hodiaŭ oni devas savi ilin de elmortado), en orienta Eŭropo ili dume ne malaperis aŭ elmortis, malgraŭ perfortaj provoj de ilia poligo, hungarigo, rumanigo, bulgarigo, grekigo, rusigo ktp. (iom speciala kazo estas la belorusoj kaj ukrainoj). La problemo estis, ke al LdN mankis taŭgaj rimedoj, kompetencoj kaj ankaŭ la volo por postuli de la unuopaj ŝtatoj, ke ili respektu kaj efektive la subskribitajn traktatojn pri la protektado de la minoritatoj.

Kiel la situacio de la protekto kaj de la rajtoj de la etnaj minoritatoj de iure kaj de facto konkrete evoluis en la intermilita tempo en la unuopaj traktintaj ŝtatoj, mi volas koncize prilumi en la sekva kompara studo en

la kazoj de Pollando, Baltaj Ŝtatoj, Ruslando, Rumanio kaj Jugoslavio, por konstati paralelojn kaj diferencojn, sukcesojn kaj malsukcesojn.

Pollando:

Ĉar la federisma koncepto de Piłsudski, kiu revis pri Pollando en unuiĝo kun Litovio, Belorusio kaj Ukrainio,² ne estis realigita, la dua pola respubliko restis unueca, centrisma ŝtato. Tamen, de facto PL estis multetna ŝtato. Interetnaj konfliktoj estis antaŭvideblaj. En la komenco granda parto de la reprezentantoj de la etnaj malplimultoj negative rilatis al tiu ŝtato. Laŭ la censo de 1931 en PL vivis poloj (68,9%), ukrainoj (13,9%), judoj (8,6%), blankrusoj (3,1%), germanoj (2,3%), rusoj (0,4%), litovoj (0,3%), ĉeĥoj (0,1%), aliaj (2,4%). Specifaĵo de PL estas la kaŝboj, kiuj estis konsiderataj kiel poloj simile kiel la latgaloj estas konsiderataj kiel latvoj. Tiuj etnaj malplimultoj estis frustritaj pro diversaj kaŭzoj - ĉu ĉar ili opiniis, ke en PL ili troviĝas kontraŭ sia volo, ĉu ĉar ili ne sukcesis fondi propran ŝtaton. Germanio kaj SU misuzis tiun malkontentecon kaj intrige apogis agadojn, kiuj estis direktitaj kontraŭ PL, precipe en ĝia oriento, kie la malamo inter ukrainoj kaj blankrusoj kontraŭ poloj estis aparte forta, ĉar tiuj nacimalplimultoj estis minacataj de la pola asimilado. En orienta PL vivis pli da etnaj malplimultoj (ĉefe ukrainoj kaj blankrusoj) ol en okcidenta PL, kie grandparte loĝis germanoj, precipe en Lodzo. Germanio klopodis misuzi kaj manipuli la germanojn de PL por malstabiligi la polan ŝtaton, tiel ke la germana minoritato estis konsiderata de PL kiel „kvina kolono“. Kiam en 1926 Michał Grażyński farigis vojevodo de Silezio li kontraubatalis la germanajn lernejojn, terposedon kaj grandindustriistojn, tiel ke la germanoj de PL plendis en almenau 100 kazoj kontraŭ la nerespekto de la konceraj koncerna pol-silezia traktato. La konflikto inter PL kaj la Vejmara Respubliko estis atingita en 1931/32. La ĉ. 600'000 judoj, kiuj vivis ĉie en la lando, kaj kiuj ricevis la plan ŝtatancon, en principo pozitive rilatis al la ŝtato de Piłsudski. Sed en la 30aj jaroj ilia situacio malboniĝis sub la impreso de kreskanta antisemitisma premo el Germanio. Okaze de la militeksplodo en septembro 1939 la judoj staris lojale flanke de PL, en kies defendado ili aktive partoprenis. La litovoj de PL, ĉefe kamparanoj, disponigis pri sufiĉe multaj kulturaj institucioj, propraj lernejoj kaj gazetaroj. La situacio de la litovoj en PL ankaŭ dependis de la oficialaj rilatoj inter PL kaj LT, kiuj en la intermilita tempo ĝenerale estis malbonaj. Litovoj en PL kaj poloj en LT ofte devis elteni reciproke venĝemon.

La ĉefa dokumento, kiu estis ratifita de PL kaj kiu reguligis la rajtojn de la etnaj minoritatoj, datiĝas de la 28a de junio 1919. Ĝi entenis tutan aron da ĝeneralaj garantioj, kies efektiviĝo kaj sekurigo estis kontrolataj de LdN. La registaro en Varsovio negative rilatis al tiu traktato, pro diversaj kaŭzoj: La traktato estis trudita de la Entento, tiel ke la Entento havis nur rajtojn kaj PL nur devojn. Krom tio, la poloj en Germanio ne ricevis la samajn garantiojn kiel la malplimultoj en PL ricevis ilin. Ĉar tiu problemo ne povis esti solvita, la pola flanko deklaris en 1934, ke ĝi intencas distanciĝi de tiu regularo kaj anoncis, ke ĝi denove subskribos la traktaton pri la protekto de la minoritatoj nur, se tia konvencio validas en tuta Eŭropo. Tiu paŝo havis ĉefe politikajn sekvojn, ĉar la juraj kondiĉoj, kiuj estis validaj kadre de la pola jura ordo, ne ŝanĝiĝis por la malplimultoj. Rilate al SU, PL devigis sin respekti la promesojn de la Traktato de Riga de 1921, kiu garantiis rajtojn al la blankrusa, ukraina kaj rusa malplimultoj sur la kampo de la libera disvolviĝo de la propraj kulturo, lingvo kaj religio. La traktatpartioj devigis sin reciproke respekti la saman aŭ egalan traktadon de la popoloj. Ĉar la ukrainoj sentis sin en malavantaĝa situacio, ili protestis kontraŭ la Sejmo kaj militece agadis en la sudoriento. Krom iu traktato, kiu koncernis la silezianojn en PL, ekzistis pol-ĉeĥoslovaka traktato el la jaro 1919/1925, kiu enhavis la malpermeson de la diskriminacio kaj plurajn rajtojn, kiuj devis esti garantiataj sur la kampoj de la edukado kaj la utiligo de la propra lingvo en rilatoj kun ŝtataj instancoj. La pola konstitucio de la 21a de marto 1921 entenis detalan katalogon de bazaj rajtoj, inter alie la rajtojn de la konscienco kaj liberprotea religia praktikado. Ĉiu civitano rajtis konfesi kaj konservi sian propran naciecon, utiligi sian lingvon kaj flegi sian etnan kulturon. La ŝtataj leĝoj devis garanti al la naciaj malplimultoj plenan kaj liberan disvolviĝon de la propraj trajtoj kun la helpo de publikaj juraj organizaĵoj kadre de la regiona administrado. La ŝtato ricevis la rajton kontroli kaj financi tiujn organizaĵojn. La civitanoj havis ankaŭ la rajton fondi kaj administri proprajn organizaĵojn, lernejojn kaj edukejojn. La bezonojn de la etnaj malplimultoj kontentigis ankaŭ la lingvaj leĝoj de la 31a de julio 1924, kiuj proklamis en la regionoj, kie etnaj minoritatoj loĝis, la lingvojn de tiuj malplimultoj kiel oficialajn lingvojn krom la pola lingvo. La nova konstitucio de la 23a de aprilo 1935 konservis en principo la rajtojn fiksitajn en la konstitucio de 1921. Art. 7 entenis malpermeson de la diskriminacio. Kompare kun la malnova konstitucio,

² Pri la federismaj konceptoj de Piłsudski vd. <http://www.ku.de/forschungseinr/zimos/publikationen/forum/zeitgeschichte/marek-kornat-die-wiedergeburt-polens-als-multinationaler-staat-in-den-konzeptionen-von-jozef-pilsudski>.

la nova versio enhavis la principon de la korporacia ŝtatkompreno, laŭ kiu la amplekso de la rajtoj celantaj influi la publikajn aferojn, povis esti mezurita laŭ la „valoro de la klopodoj por publikaj meritoj“. Ĉi tiu guma artikolo donis spacon por diversaj interpretoj. Krom tio, la regionoj kaj vojevodioj de PL havis rajtojn de aŭtonomeco, ekzemple en la vilna regiono. En orienta PL ekzistis la tipo de la dulingva lernejo. Sed ĉie la pola premo estis granda: ĉiuj devis lerni la polan lingvon, la polan historion kaj la polan literaturon. Do, ĝenerale oni povas diri, ke en la intermilita tempo la pola jura sistemo kreis taŭgajn kondiĉojn por la disvolviĝo de la etnaj minoritatoj. La pola juro garantiis al la naciaj minoritatoj ties civitanajn rajtojn en plena amplekso kaj la politikan partoprenon en plena mezuro. La ideo estis doni la plenan egalrajtecon de ĉiuj civitanoj senkonsidere al la etna aparteneco, sub la kondiĉoj de unueca kaj centrisma ŝtatkonstruo. Post la parlamentaj elektoj de 1922, 86 el 444 lokojn okupis reprezentantoj de etnaj minoritatoj, post la elektoj de 1928 eĉ 87. Sed ĝenerale la pola politiko koncerne la etnajn minoritatojn devas esti konsiderata kiel nekonsilena kaj senkoncepta. La registaro de W. Grabski (decembro 1923 ĝis septembro 1925) celis progresigi la edukadon, religion kaj kulturon de la etnaj malplimultoj, ekzemple oni volis fondi ukrainan universitaton en Lvovo. Samtempe, el la tempo de la registaro de Grabski originas leĝoj, kiuj malbonigis la situacion de la malplimultoj. Post la ŝtatrenverso en 1926 la prioritatoj en la koncepto por la malplimultoj ŝanĝiĝis. La politikistoj de Sanacja celis antaŭenpuŝi la programon de la t.n. „ŝtata asimilado“. Tiu politiko ne signifis nacian aŭ etnan asimiladon sed politikon, en kiu la supera ŝtata lojaleco de ĉiuj civitanoj sendepende de la etno devis anstataŭi la nacian solidarecon. Per tiu ideo de la poleco kiel ŝtata ideo oni esperis solvi la etnajn antagonismojn kaj konfliktojn. La tasko de la lernejoj ne estis eduki polojn en etna senco, sed produkti lojalajn ŝtatacivitanojn. Ŝajnas ke la etnaj minoritatoj en principo apogis tiun ideon. Ĉi-rilate, la pola ministro pri religiaj konfesoj kaj publika klerigo S. Czerwiński diris en 1929: „Ni ne rajtas kaj ne volas postuli de la lernejoj kaj aliaj edukaj institucioj en PL, ke ili eduku la germanojn kaj la ukrainojn kiel polojn aŭ la evangelianojn kiel ortodoksojn. Sed ni havas la rajton postuli, ke ĉiuj, kiuj aktivis en la publika edukado, laboras por la fortigo de la respubliko“. Fakte, ĉiuj teoriistoj de la registara tendaro pledis por la „nacia asimilado“ kaj por ampleksaj formoj de la teritoria memadministrado por ukrainoj kaj blankrusoj kaj por la sekurigo de ĉiuj liberecoj favore al la prosperigo de la kultura kaj nacia identecoj. Ĉiuspecajn formojn de la forpelado (ostracismo) de la judoj oni rifuzis. Per tio la pola registaro celis ankaŭ eviti formojn de reakcia agado kontraŭ la pola ŝtato fare de nekontentaj civitanoj kaj etnaj minoritatoj, kiuj estas influitaj kaj manipulitaj de ekstere. Tamen, la planoj de la aŭtonomeco por etnaj malplimultoj neniam estis efektivitaj. Ekzemple la vojevodo de Volhinio klopodis interpaciigi polojn kun ukrainoj kaj gajni la ukrainojn por la subteno de PL. Sed H. Józewski, kiu tiel multe klopodis por la pol-ukraina amikeco, estis maldungita en 1938, kiam la naciismaj fortoj komencis domini la politikon de PL. Post la morto de Piłsudski (1935) okazis dekompozicio (reorganizado) de la registara tendaro. La armeaj medioj gajnis pli da influo kaj forlasis la koncepton de la Piłsudski-tendaro, kiu provis savi Pollandon kiel ŝtaton kaj la ekzistadon de aliaj etnoj vivantaj en tiu ŝtato. La konflikto inter la plimulto kaj la malplimultoj kreskis, sed intenca persekutado de la etnaj minoritatoj tamen ne okazis. La nova ideologio celis la firmigon de la etna poleco. Okazis ke la registaro forprenis la polan civitanecan de homoj, kiuj estis konsiderataj kiel neloyalaj, precipe germanoj kaj judoj!!!

Ĉi tiu konciza skizo de la historio de la politiko rilate la etnajn malplimultojn en PL en la intermilita tempo montras, ke en la regno de Piłsudski ekzistis interesaj klopodoj harmoniigi la politikon koncerne la etnajn malplimultojn kaj la rilatojn inter tiuj (cetere, al la ciganoj oni atribuis malmultan atenton). Temis pri konceptoj, pri kiuj Zamenhof eĉ ne pensis aŭ kiujn li ne povis imagi aŭ proponi, ĉar li ne okupiĝis kiel politikisto, juristo aŭ etnologo science pri tiuj demandoj (sed havis proprajn kuriozajn ideojn, kiuj estis realec-fremdaj). Do, anstataŭ la ideoj de Zamenhof en PL ekzistis realaj alternativoj, ŝancoj kaj perspektivoj por solvi la interetnajn konfliktojn. Por tio necesis saĝa, realisma, ekvilibrita kaj tolerema politiko. Bedaŭrinde, la naciismo, antisemitismo kaj komunismo denove detruis ĉiujn tiujn subtilajn klopodojn kaj provojn.³ En la sekvo ni komparu la evoluon en la baltaj ŝtatoj.

Litovio:

Iam la Litova Grandprinclando (kiu ekzistis ĝis 1795) estis multetna ŝtato, en kiu kune vivis litovoj, poloj,

³ Pli detale vd. la kontribuojn de T. Milej kaj A. Malicka pri Pollando sub <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>, krome vd.: Hugo Wintgens: Der völkerrechtliche Schutz der nationalen, sprachlichen und religiösen Minderheiten (...) in Polen. Stuttgart 1930. Pri la germana minoritato en PL vd.: A.S. Kotowski: Polens Politik gegenüber seiner deutschen Minderheit 1919-1939. Wiesbaden 1998.

blankrusoj, ukrainoj, judoj, karaimoj, tataroj, rusoj, k.a. En Eŭropo tiu regno estis en principo laŭdata kiel lando, en kiu diversaj etnoj kaj kulturoj vivas en paco kaj harmonio. Post sia likvido fare de la eŭropaj grandpotencoj la kerna litova lando apartenis dum 123 jaroj al la Ruslanda Imperio kaj estis administre dividita inter la gubernioj de Vilno, Kovno kaj Suvalki. La 16an de februaro 1918 la litova nacia konsilio proklamis la sendependecon de la Litova Respubliko kaj Litovio renaskiĝis kiel nova memstara ŝtato, tamen sen ukrainaj kaj belorusaj teritorioj. Ĝi estis agnoskita kaj de Germanio kaj de SU. Post la litova sendependiĝo la ŝtato enkondukis, sub la premo de LdN, liberalisman-tolereman politikon rilate la naciajn malplimultojn, kiuj ĝuis konsiderindan kulturalan aŭtonomecon. La eŭropaj pactraktatoj kaŭzis, ke precipe la juda minoritato (ĉ. 7,6%) de LT ricevis sufiĉe ampleksan kulturalan aŭtonomecon. Ekzistis juda nacia konsilio kaj eĉ propra ministerio pri judaj aferoj. Ankoraŭ en la carisma Ruslando la esperoj de la judoj orientiĝis pli forte laŭ la opcioj de la emancipiĝo kaj aŭtonomeco de la unuopaj popoloj de Ruslando kun la celo starigi demokratian federacion. Tia perspektivo ŝajnis al multaj ruslandaj judoj pli promesplena ol malgranda naciŝtato. Pro tio, la opcio de etne konceptita litova naciŝtato multaj judoj ne apogis. Sed kiam en 1918 montriĝis la perspektivo de ĝuste tia ŝtato, la judoj atendis por vidi kiel tiu ŝtato funkcios kaj faris sian sintenon dependa de la reguligo de la aŭtonomeco koncernanta ilin. En cionisma kongreso, kiu okazis en 1918 en Vilno, estis akceptita rezolucio, en kiu la judoj bonvenigis la restarigon de Litovio kiel sendependa ŝtato. Judoj kunlaboris en tiu projekto kaj tri judoj eĉ fariĝis ministroj en la nova registaro. Post kiam do la litova ŝtateco fariĝis realaĵo, la judoj adaptiĝis kaj montris sin lojalaj al la nova ŝtato. Ĝenerale, la judoj fidis la reĝimon de Smetona kaj kredis, ke nenio malbona okazos al ili tiom longe ke li regas la landon. Tiel, la litoviaj judoj fariĝis lojalaj civitanoj de Litovio, malgraŭ iuj antisemitismaj incidentoj, kiuj ĝenis la judojn de tempo al tempo.

Sed la kulturalan aŭtonomecon ricevis ankaŭ aliaj etnaj minoritatoj: poloj (3,2%), rusoj (5%), germanoj (1,4%), blankrusoj (0,2%). Specifaĵo de Litovio estas la minoritato de la karaimoj, juda sekto kun turkida lingvo. En la paragrafo pri „rajtoj de la naciaj minoritatoj“ ankaŭ la litova konstitucio de la 1a de septembro 1922 garantiis kulturalan aŭtonomecon. Ĝi koncernis antaŭ ĉio la klerigon, bonfaradon kaj reciprokan helpon. Se certaj kondiĉoj estis plenumitaj, la etnaj minoritatoj povis havi memstaran impostan juron kaj pretendi ŝtatan financan subvencion, precipe tra la komunumoj. Sed la situacio por la minoritatoj draste malboniĝis meze de la 1920aj jaroj, precipe post la puĉo de la Tautininkai-naciistoj sub ŝtatprezidento Antanas Smetona. Vilno estis okupita de PL kaj la Memellando de LT en 1923. La politika evoluo de LT en la direkto de aŭtoritativa unupartia ŝtato kaŭzis, ke la juda aŭtonomeco ne plu ekzistis longe. En 1925 la juda ministerio kaj la juda konsilio estis malfonditaj, la koncerna leĝaro abolita. Per la dissolvo de la litova parlamento en 1927 la juda, pola kaj germana minoritatoj perdis la eblecon partopreni en la kreado de la publika vivo, kiun ili havis tra siaj parlamentaj deputitoj. La litova ŝovinismo kaŭzis ankaŭ, ke la nombro de la popolaj lernejoj de etnaj malplimultoj (precipe judaj, polaj, germanaj kaj rusaj) malkreskadis ĝis la 30aj jaroj. Iomete pli favora estis la situacio de la minoritatoj en la Memellando, kiu formis apartan aŭtonoman zonon ene de LT. En marto 1939 LT subskribis kun la germanoj traktaton, laŭ kiu la Memellando devis esti redonita al la Germana Regno. Dum la rilatoj kun Germanio kaj PL restis malbonaj (la limoj kun PL restis fermitaj), preskaŭ la tuta juda loĝantaro de LT (ĉ. 250'000 homoj) estis radikale neniigita kaj ekstermita dum la dua mondmilito fare de la germanaj nazioj, kun la aktiva helpo de litovaj politikaj instancoj kaj armeaj taĉmentoj.⁴

Latvio:

Latvio, kiu formiĝis kiel naciŝtato de la latvoj (77%) surbaze de la historiaj partoj de Livlando, Kurlando, Zemgalio kaj Latgalio, heredis plurajn etnajn nacimalplimultojn: rusojn (8,8%), judojn (4,9%), germanojn (3,3%), polojn (2,5%), blankrusojn (1,4%), litovojn (1,2%), estonojn, ciganojn, ukrainojn (malpli ol 1%). Kompare kun la katolika LT, specifaĵo de Latvio estas, ke en Latgalio vivas katolikaj kaj ortodoksaj minoritatoj, dum la latvoj ĝenerale estas protestantoj. Sed tiuj diferencigoj aperas en neniu statistiko, ĉar la latgaloj estas konsiderataj kiel latvoj. La aliĝo de Latvio al LdN dependis de la garantioj, kiujn Riga faris al la etnaj minoritatoj en la lando. En la komenco, la ĉi-koncerna leĝaro estis adoptita ĉefe sur la kampo de la edukado kaj sufiĉe pozitive influis ĝin. La koncerna leĝo antaŭvidis, ke la rajto de la utiligo de la gepatra lingvo en la lernejoj estis agnoskita, kaj ke la ŝtataj kaj komunumaj instancoj estas devigataj disponigi taŭgan kapacitaron kaj instrumentaron. Se kolektiĝis 30 infanoj aŭ lernantoj, aparta klaso kun instruado de la koncerna gepatra lingvo devis esti instalita. La kleriga sistemo de la etnaj minoritatoj estis aŭtonoma en

⁴ Pli detale vd. la konstruaĵon de C. Schmidt pri Litovio sub <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>.

sia organizado, t.e. la lernejoj administracioj mem decidis pri la lernejoj modeloj, instruplanoj kaj ekzamenaj ordoj. Ene de la kleriga sistemo povis esti instalitaj specialaj sekcioj, kiuj okupiĝis pri la administrado de la propraj aferoj sub la observado de la kleriga ministerio. La estroj de tiuj lernejoj administracioj, kiuj estis konsiderataj kiel kompetentuloj pri ĉiuj „kulturaj demandoj“, devis esti proponitaj de la minoritatoj aŭ de la parlamentaj reprezentantoj mem kaj konfirmitaj de la registaro. La sistemo do havis krom lerneja aŭtonomeco ankaŭ trajtojn de kultura aŭtonomeco.

Aliflanke, la ankrado de la rajtoj de la minoritatoj en la konstitucio fiaskis, kvankam la „Politika platformo de la latva popola ŝtato“ antaŭvidis ankaŭ la garantiadon de kulturaj/lingvaj kaj etnaj rajtoj al la minoritatoj vivantaj en Latvio. Sed la tuta parto pri la bazaj rajtoj finfine estis rifuzita de la parlamento en 1922. Malgraŭ tiu manko, la unuopaj etnaj minoritatoj vigle kaj aktive utiligis la ekzistantajn leĝojn favore al la organizado de la kleriga kaj lerneja sistemoj. Sensukcesaj en Latvio restis la klopodoj de la germanoj, judoj kaj rusoj atingi kulturen aŭtonomecon, kiel tio okazis en Estonio, ĉar en la parlamento ne ekzistis la necesa plimulto por tio, kaj la klopodoj de la minoritatoj krei komunan platformon pere de organiza kuniĝo de la kulturaj asocioj estis evititaj de la latvaj naciismaj-ŝovinismaj medioj, kiuj fortiĝis post la monda ekonomia krizo en la 30aj jaroj. Kvankam la provoj de tiuj medioj nuligi la atingojn de la klerigaj administracioj de la minoritatoj dume fiaskis pro la kontraŭstarado de la parlamento, la ŝtata renverso de majo 1934, en kiu la ŝtatestro Kārlis Ulmanis instalas diktatorecan reĝimon, aŭtomate signifis la finon de la liberalisma minoritata politiko. La lernejoj administracioj estis reorganizitaj kaj ilia aŭtonomeco estis limigita, kio inter alie signifis, ke la nombro de la porminoritataj lernejoj malkreskis post julio 1934, kiam nova popolkloriga leĝo estis akceptita, kiu pli strikte reguligis la etnan apartenecon kaj altigis la nombron de lernantoj, kiu estis necesa por malfermi publikan lernejon por la etnaj malplimultoj. En 1939 la germanoj de Latvio estis devigitaj translokiĝi al la Germana Regno, kaj la judoj estis persekutitaj kaj neniigitaj en la koncentrejoj de Latvio, dum la „rusoj“ baldaŭ transprenis la povon en la lando.⁵

Estonio:

La nova Estona Respubliko, kies teritorio konsistis el la iama estona gubernio de la Ruslanda Imperio kun la urbo Reval (Tallinn) kaj la norda parto de la iama livlanda gubernio kun la urbo Dorpat (Tartu), kie vivis ĉefe etnaj estonoj, ampleksis, laŭ la popola censo de 1922, 92,5% estonojn. La ĉefaj etnaj malplimultoj estis praktike nur tri: rusoj (3,7%), germanoj (1,7%) kaj svedoj (0,8%). La anoj de tiuj minoritatoj vivis aŭ en la urboj aŭ dise tra la lando. La svedoj vivis ĉefe ĉe la nordokcidenta marbordo kaj sur la insuloj, kaj la rusoj loĝis en kaj ĉirkaŭ Narva, borde de la Peipsi-lago kaj en la regiono de Petseri (Peĉora). Etnografia specifaĵo de Estonio estas la popolgrupo de la Setu-oj, kiuj estas arkaika finn-ugra tribo vivanta en la sudorienta parto de la lando. Sed kiel la latgaloj en Latvio la setuoj ne formis apartan etnan minoritaton kiel la germanoj, rusoj, svedoj, poloj, litovoj ktp.

Sendube, plej progresinta en la baltaj ŝtatoj estis la minoritata juro de Estonio. La oficialaj etnaj minoritatoj de Estonio ĝuis vastajn rajtojn, kiuj estis fiksitaj en la konstitucio. La unua estona konstitucio de la 15a de junio 1920 garantiis al ĉiuj etnaj minoritatoj la rajton havi instruadon en la gepatra lingvo. La germanoj, rusoj kaj svedoj rajtis komuniki kun la centraj instancoj ankaŭ en la propra lingvo. En lokoj, kie iu etna minoritato formis la plimulton, tiu minoritata lingvo estis permesita kiel dua oficiala lingvo. Fakte, la rusoj kaj svedoj rajtis utiligi siajn lingvojn en la koncernaj loĝregionoj jam surbaze de koncerna administra leĝo de la 19a de novembro 1918. Krom tio, la minoritatoj ĝuis kulturen kaj socialan aŭtonomecojn, se ili deziris havi ĝin kaj se ĝi ne kontraŭdiris la ŝtatajn interesojn. Kulturen aŭtonomecon povis ricevi etnaj minoritatoj, kiuj havis minimume 3000 membrojn, sed tiuj anoj devis oficiale konfesi kaj konfirmi sian apartenecon al iu minoritato (en 1936 la judoj plenumis tiun kriterion, deklarante 3045 anojn). Ĉiu civitano, kiu plenumis la 18an jaraĝon, povis fari tion. Simile kiel en Litovio kaj Latvio, la aŭtonomaj minoritataj organizaĵoj povis mem organizi siajn strukturojn kaj la lernejajn aferojn, peti subvenciojn tra la komunumoj kaj enkasigi impostojn. La kultura aŭtonomeco en Estonio ne baziĝis sur la teritoria sed sur la persona principo. Jura specifaĵo de Estonio estis, ke la unuopaj minoritataj grupoj povis organiziĝi kiel persona asocio. Ŝajnas, ke ne ĉiuj minoritatoj profitis tiujn rajtojn en sama grado. Precipe la germana kaj juda minoritatoj utiligis tiujn formojn de la aŭtonomeco. La koncernaj leĝoj de la 20aj jaroj kaj de 1934 pri la utiligo de la propra lingvo validis por ĉiuj lernejoj (popolaj bazlernejoj, mezlernejoj, gimnazioj). La minimuma nombro de lernantoj por fondi klason devis esti 20, sur la pli malgrandaj insuloj 15. En 1934 aldoniĝis la latva

⁵ Pli detale vd. la kontribuojn de C. Schmidt pri Latvio sub <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>, krome vd.: Pli detale pri la kazo de Latvio vd. Gert Engemann: Das Recht der nationalen Minderheiten in Lettland. Riga 1930.

minoritato al tiuj reguligoj. Kompare kun Latvio kaj Litovio, kie la porminoritataj rajtoj estis reduktitaj, en Estonio ili estis eĉ plilarĝigitaj en nova *lingva* leĝo de la 29a de oktobro 1934, kiu antaŭvidis, ke la konsilio de la koncerna komunumo povas decidi pri sia lingvo, kun gravaj sekvoj por la utiligo de la koncerna lingvo en tribunaloj aŭ politikaj instancoj. Inter 1920 kaj 1932 la germana kaj rusa minoritatoj estis reprezentitaj en la estona parlamento, la sveda ekde 1929. La rusoj estis malbone organizitaj. En 1939 la germanoj de Estonio estis devigitaj translokiĝi al la Germana Regno, kaj la (relative malmultaj) judoj de la ando estis deportitaj kaj neniigitaj en la koncentrejoj de Estonio.⁶

Ruslando:

La agresema kaj perfida imperiisma konkera kaj okupacia disvastiĝo de la ruslanda potenco ĉefe de post la 16a jarcento laŭ ĉiuj geografiaj direktoj kaŭzis, ke Ruslando fariĝis unika multetna ŝtato sui generis, en kiu vivis inter 100 kaj 150 diversaj etnoj aŭ gentoj de plej diversaj originoj. Laŭ la popola censo de 1897 la etnaj rusoj ampleksis nur 44% de la tuta loĝantaro de la Ruslanda Imperio. Dum longa tempo, en la carisma Ruslando la aparteno al iu etna minoritato ne ludis gravan rolon. En la feŭda ordo de la sociaj klasaj statusoj, en kiu ekzistis nur regantoj kaj regatoj (iamaj servutuloj) ne gravis la etna aŭ religia aparteneco, sed esence estis ĉu oni apartenas al la nobelaro (aŭ origine aŭ per kooptado) aŭ al la simpla popolo (plebo). Eĉ la etna deveno de la kamparanoj ne ludis la esencan rolon (en la baltaj landoj la estonoj kaj latvoj estis nomataj „malgermanoj“/“Undeutsche“) sed ilia statuso kaj tuta sorto dependis de la volo de la koncerna regiona nobelaro, ekzemple pola, germana, sveda aŭ de la kozakoj en Ukrainio aŭ tataroj en la regionoj de la iamaj islamaj ĥanlandoj, ekzemple sur Krimeo. Ekzistis liberaj kamparanoj aŭ rusaj kozakoj en la regionoj de Volgo kaj Dono, kiuj ĝuis certajn privilegiojn. Specialan statuson havis ankaŭ la t.n. „inorodcy“, kiuj koncernis precipe la nomadojn kaj la muzulmanojn en norda Kaŭkazo. La judoj, kiuj devis loĝi en speciala zono ĉe la okcidenta rando de la imperio, kiun ili ne rajtis forlasi, estis liberigitaj de la militservo. La caristoj klopodis per diversaj dubindaj metodoj asimili la judojn, sed pro kulturaj, religiaj kaj juraj kaŭzoj la judoj ĝenerale rifuzis asimiliĝi. Ktp. Ĉi tiu en principo sufiĉe tolerema minoritata politiko ŝanĝiĝis en la 19a jarcento, precipe dum la konservativa, reakci-naciisma, ksenofobia kaj antisemitisma regado de la caro Aleksandro III. kaj Nikolao II. Lige kun la administra kaj teritoria reorganizado de la lando la etnaj malplimulto estis lingve kaj kulture rusigitaj kaj jure pli kaj pli diskriminacitaj kaj subpremataj, kun fatalaj sekvoj. La lingvoj de certaj popoloj (kiel poloj, litovoj, ukrainoj, kartveloj) estis praktike malpermesitaj. Nur en la unua ruslanda parlamento (dumao) de 1906 la etnaj minoritatoj ricevis mandatojn, kiuj poste denove estis draste reduktitaj, do iliaj politikaj esperoj ne plenumiĝis. Ĉi tiu politiko akcelis la naciismajn movadojn de la koncernataj popoloj en la okcidento kaj sudo de la imperio, kiuj preferis forlasi la regnon post la revolucio de 1917. Sed kun la escepto de Pollando, Finnlando kaj la baltaj ŝtatoj tiu disiga procezo ne longe daŭris kaj la rusoj, al kiuj baze mankas (fakte ĝis hodiaŭ) la kompreno por la rajto de sendependeco de tiuj popoloj, sukcesis rekonkeri la perditan teronon.

Ruslando estis nomata „multpopola malliberejo“, kaj Lenin kulpigis (en 1913) la „rusan grandŝovinisman“ pri tio, ke ĉiuj nacioj estas „neimageble subpremataj de la carisma monarkio“ kaj ke Ruslando „nuntempe estas la plej subevoluinta kaj plej reakcia ŝtatformo en komparo kun ĉiuj najbaraj landoj“. En julio 1918 estiĝis la „Rusa Socialisma Federa Sovetrespubliko“ (RSFSR), kiu kune kun la Ukraina SSR, Belorusa SSR kaj Transkaŭkaza SSR fondis Sovetunion (USSR) en 1922/23. Iom post iom estis kreitaj 11 (1936) kaj 15 (1949) diversaj sovetiaj respublikoj kaj amaseto da aŭtonomaj respubliketoj, kiuj estis konstruitaj laŭ etnaj kriterioj. Ĉar la komunistoj ne ŝatis la nocion etna ‘malplimulto’, ili enkondukis la terminojn nacioj, naciecoj aŭ popoloj. Kiel instrumentoj de la ‘minoritata’ politiko servis la ideo de la sovet-feder(al)ismo kaj sovet-aŭtonomeco, kiuj baziĝis sur la teritoria principo. Kiel bazo de la minoritata politiko kaj kiel ŝlosila nocio de la bolŝevisma retoriko servis la leninisma koncepto pri la „memdecida rajto de la popoloj“. Stalin, kiu en 1917 fariĝis komisararo pri nacia politiko,⁷ devis efektiviĝi la leninisman nacian politikon, pri kiu li estis konsiderata kiel fakulo kaj verkis eseon en 1913.⁸ La „Deklaracio pri la rajtoj de la popoloj de USSR“ antaŭvidis: Egalecon kaj suverenecon de la popoloj de Ruslando, rajton de la popoloj de Ruslando je libera

⁶ Pli detale vd. la konstruadojn de C. Schmidt pri Estonio sub <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>, krome vd.: Estland und seine Minderheiten. Esten, Deutsche und Russen im 19. Und 20. Jahrhundert. Lüneburg 1995, kaj Detlev Henning (eld.): Nationale und ethnische Konflikte in Estland und Lettland während der Zwischenkriegszeit. Lüneburg 2009.

⁷ Informojn vd. sub https://ru.wikipedia.org/wiki/Народный_комиссариат_по_делам_национальностей_РСФСР.

⁸ Vd. lian eseon „Marksismo kaj la nacia demando“ (germanlingve sub <https://www.marxists.org/deutsch/referenz/stalin/1913/natfrage/index.htm>)

memdecido inkluzive de la separiĝo kaj formado de ŝtata sendependeco, liberan disvolviĝon (aŭ disvolvado) de la naciaj minoritatoj kaj etnografiaj grupoj (sic), kiuj vivas sur la teritorio de Ruslando.⁹ Lenin ne nur celis atingi la plenan egalecon de ĉiuj sovrespublikoj, sed li propagandis ankaŭ la „pozitivan diskriminacion“ de la rusa kulturo por forviŝi naciismajn separatismajn strebadojn. Ĉi tiu koncepto nomiĝis „korenizacia“, al kiu apartenis la strategio disponigi al la lokaj partiaj instancoj surlokajn, „indiĝenajn“ funkciulojn, kiuj konas la kulturon kaj tradiciojn de la loka popolo. La intenco de tiu strategio estis la „indiĝenigo“ kiel formo de psikologia efiko por ŝajnigi, ke la soveta potenco estas loka, popoleca, hejma afero kaj por eviti la impreson, ke tiu potenco estas importita aŭ altrudita de la rusa ŝovinismo. En tio la loka lingvo devis ludi elstaran rolon por la propagando de la soveta potenco. Modernigaj agadoj sur la eduka kampo kiel ekzemple alfabetigaj kampanjoj en la lokaj kaj gepatraj lingvoj devis malfortigi la kontraŭsovetajn sentojn kaj kontraŭrusajn emociojn kaj disvastigi la socialismajn ideojn. En la 20aj jaroj 48 lingvoj ricevis propran alfabeton, kaj verkaĵoj de la literaturo en tiuj lingvoj estis pli ofte eldonitaj (kio estis konsiderata kiel granda merito de tiu kampanjo). En tiu proceso la latina alfabeto (kiu estis konsiderata kiel alfabeto de la monda revolucio) estis preferata al la cirila, precipe ĉe la islamaj kaj turklingvaj popoloj, ĉar oni atendis la mondan revolucion. Sed la islamaj popoloj estis konfuzitaj, ĉar tiu „modernigo“ estis konsiderata de la koncernitaj popoloj kiel atako kontraŭ la araba skribo kaj islama kulturo. Sur la koncernaj minoritataj teritorioj la rusoj eĉ devis lerni la lingvojn de tiuj etnaj malplimulto, pri kio probable ne ĉiuj rusoj ĝojis. La komunisma propagando, kiu estis efektivegita en tiuj lokaj lingvoj, ne ĉie estis volonte akceptita. Samtempe estis desegnitaj novaj limoj por tiuj etnaj teritorioj, kio kondukis al absurdaj situacioj. En la censo de 1926 ĉiu soveta civitano devis deklari al kiu etna identeco li aŭ ŝi apartenas. En tiu censo aperis 190 diversaj etnaj identecoj, kiuj teorie devis ricevi unuopan teritorion, kion fari praktike ne eblis. Ĉar tiuj klopodoj finfine parte fiaskis, en SU oni transiris al la perforta alternativo kaj provis pere de deviga translokado, deportado aŭ fizika likvido solvi la nacian problemon.

Do, la koncernaj dekretoj kaj la provo konstruadi la federismon kaj aŭtonomecon finfine ne ĉiam helpis aŭ utilis al la etnaj malplimulto eĉ en siaj propraj respublikoj. Ĉar se la koncerna etna minoritato kiel ekzemple la kazahoj ne formis la realan plimulton en sia respubliko, la eblecoj de tiu etno favoriĝi ties nacian evoluon estis limigitaj. La plimulto ĉiam povis decidi malfavore al la malplimulto. Netuŝitaj, do ekster la aŭtonomeca koncepto restis la anoj de tiuj nerusaj popoloj, kiuj ne troviĝis sur la teritorio de sia nacia respubliko, kaj la etnoj, por kiuj ne estis kreitaj tiaj respublikoj. Por la judoj estis kreita formala respubliko en fora siberia Birobiĝano, kie loĝis nur malmultaj judoj, nome 0,6% (ĉi tiu absurda respubliko ekzistas fakte ĝis nun). Ankaŭ tataroj kaj mordvoj estis koncernataj de tiu problemo, ĉar ili formis nur la malplimulton de la loĝantaro de sia etna respubliko. Aliaj kazoj estis la germanoj, kiuj havis du milionojn da anoj sed kiuj „pendis en la aero“ post la likvido de sia respubliko (fondita apud Saratov en la volga regiono en 1924, likvidita en 1941) aŭ la poloj kun unu miliono da anoj, kiuj tute ne ricevis propran respublikon aŭ aŭtonomecon (ekzemple poloj en Belorusa SSR). La liberalisma kaj tolerema minoritata politiko de la soveta ŝtato en la 20aj jaroj tute ne signifis, ke al tiaj unuopaj etnaj minoritatoj estis disponigitaj rimedoj por konservi la propran kulturon. Male, la ĉefa celo de la ŝtato estis utiligi ilin por sekurigi la komunisman potencon kaj antaŭenpuŝi la (utopian) ideon de la kunfandiĝo de la popoloj kaj kreado de unueca soveta popolo. La komunistoj esperis, ke la socialismaj fortoj estos tiel grandaj, ke ili aŭtomate anstataŭos la naciismajn tendencojn kiel heredaĵon de la burĝa ideologio. Laŭ sia kompreno la marksismo-leninismo ne estis harmoniigebla kun la naciismo, sed ĝi celis la internaciismon kaj la kunfandiĝon de la popoloj en unu, pli superan unuon. Samtempe la marksismo pledis kontraŭ la subpremado de la nacioj sed ne favoris la batalon por la evoluado kaj prosperado de „nacia kulturo“, ĉar la nacian principon ili vidis kiel komplikon de la kapitalismo kaj la burĝa mondo. La marksistoj, kiuj pli forte emfazis la signifon de la klasbatalo, ankaŭ diris, ke ili negative rilatas al federalismo kaj malcentrigo. Sed en principo la nacioj rajtis mem decidi siajn bazajn problemojn kaj ankaŭ rajtis, eĉ laŭ la soveta konstitucio, forlasi la union (kio en la praktiko ne okazis kaj ne povis okazi¹⁰). En la centrisma grandŝtato la marksistoj-leninistoj vidis „gigantan historian paŝon antaŭen sur la vojo de la mezepoka displititeco al la estonta socialisma unueco de la tuta mondo“. Malgraŭ certaj kulturaj rajtoj, kiuj estis enkondukitaj sur regiona kaj loka niveloj, kaj malgraŭ la kreado de 250 naciaj subdistriktoj kaj 5300 naciaj vilaĝaj sovetoj, la supre menciitaj marksismaj-leninismaj principoj donis ankaŭ la eblecon por malhelpi la disvolviĝon de tiuj etnaj minoritatoj kaj subpremi iliajn naciismajn

⁹ Vd. https://ru.wikipedia.org/wiki/Декларация_прав_народов_России.

¹⁰ Krom eble la ŝanĝo de la respublika aparteneco kiel en la kazo de Krimeo, kiu en 1954 estis transdonita de RSFSR al Ukraina SSR.

strebadojn. Post la fino de la liberalisma ekonomia politiko (NEPo) en SU finiĝis ankaŭ la relative tolerema minoritata politiko. Nun estis Stalin, kiu difinis, evoluigis kaj ekpraktikadis sian propran komprenon pri la nacia kaj minoritata politiko, kiu parte malkongruis kun tiu de Lenin, kiu forpasis en 1924. Dum Lenin celis, por atingi la unuecan socialisman ŝtaton, fortiĝi la federismon kaj la aŭtonomecon de la popoloj, Stalin intencis pli rapide transiri al sistemo, kiu signifis la limigon de la rajtoj de la etnaj minoritatoj kaj la centrigon de la ŝtato en pli forta grado. Ĝis la fino de la 30aj jaroj la menciitaj naciaj subdistriktoj kaj vilaĝaj sovetoj estis likviditaj. Multaj gvidantoj kaj reprezentantoj de etnaj minoritatoj pereis dum la stalinisma teroro de la jaroj 1936-38, kaj la rusa lingvo estis enkondukita kiel deviga lernfako kun la celo rusigi la lernejan kaj edukatan sistemojn. Kulminon de la persekutado kaj subpremado de etnaj malplimultoj fare de la stalinistoj formis ilia deportado dum kaj post la dua mondmilito al Siberio kaj Centra Azio – precipe germanoj, poloj, finnoj kaj koreoj estis koncernataj, al kiuj oni riproĉis, ke ili kunlaboris kun malamikaj ŝtatoj. La venĝema Stalino konis neniun kompaton aŭ pardonon. Al tio sekvis la deportado de kalmikoj, balkaroj, inguŝoj, karaĉajanoj, ĉerkeso, ĉeĉenoj, meshetoj kaj tataroj de Krimeo, kies aŭtonomaj teritorioj estis abolitaj. Ankaŭ ne malgrandaj grupoj de litovoj, latvoj kaj estonoj estis deportitaj al Siberio dum la sovetia periodo en la 1940aj jaroj. Nur post la morto de la terura kartveldevena sovetskodiktatoro en 1953, kiu agis kaj krimis en la nomo de la rusa nacio, la eksceso kontraŭ tiuj popoloj estis haltigitaj, kaj la deportitaj popoloj estis rehabilititaj kaj povis reiri en la lokojn, kie ili vivis antaŭe kaj kie iliaj naciaj teritorioj estis restarigitaj, kvankam ne ĉiam laŭ la samaj limoj. Malgraŭ tio, SU ne readoptis la 'liberalisman' politikon de la 20aj jaroj.¹¹

La katastrofa politiko de Ruslando rilate al la etnaj minoritatoj dum la historio kaŭzis, ke la aktuala situacio de la lingvoj kaj kulturoj de la unuopaj etnaj minoritatoj en Ruslando estas ege malbona – granda parto de tiuj lingvoj kaj popoloj estas minacataj de la elmortado.¹² Sed en tiu rilato Ruslando ne estas sola kompare kun aliaj landoj en norda kaj suda Ameriko, Afriko, Azio kaj Eŭropo, kie loĝas indiĝenaj popoloj kaj kie la ŝovinismo, imperiismo kaj koloniismo de pli grandaj popoloj – angloj, francoj, hispanoj, portugaloj, italoj, germanoj, poloj k.a. – bone plenumis sian kontraŭ-minoritan laboron. La danĝero, ke malgrandaj etnaj minoritatoj kaj indiĝenoj malaperas, estas tutmondaj fenomeno kaj problemoj. La faktoroj, kiuj kulpas pri tio, estas multfacetaj.

Post la analizo de la situacio de la etnaj minoritatoj en Pollando, en la Baltaj Ŝtatoj kaj en Ruslando/SU, ni ankoraŭ koncize prilumu la situacion en Rumanio kaj Jugoslavio post la unua mondmilito, por havi komparon kun la situacio en la sudorienteŭropaj landoj, kiuj apartenis ĝis 1918 parte al la Aŭstra-Hungara Imperio.

Rumanio:

Laŭ la censo de 1877, en la Rumana Princlando vivis rumanoj (84,6%), judoj (7,9%), ciganoj (3,9%), slavo (t.e. rusoj, bulgarioj, serboj k.a., 1,7%), armenoj (0,2%), ceteraj (ekz. turkoj, 1,1%). La ĉefa problemoj koncerne la minoritatojn de Rumanio ĝis la unua mondmilito estis la demando de la ŝtataneco por nekristanaj loĝantoj – tiu demando koncernis ĉefe la judojn kaj la turkojn. Per la konstitucio de 1866 estis decidite, ke nur kristanaj fremduloj povas ricevi la rumanian ŝtatanecon. Post la sendependiĝo de Rumanio en 1877 la eksterlando premis Rumanion ŝanĝi tiun paragrafon. La Berlina Traktato de 1878 starigis la kondiĉon, ke la sendependeco de Rumanio estos agnoskita nur, se la diskriminacio de la judoj fare de la rumania juro ĉesos. Post forta politika kontraŭstaro de ambaŭ partoj de la rumana parlamento kaj akompanate de antisemitismaj tumultoj, la leĝo finfine estis modifita en 1879 en tiu senco, ke la diverseco de la religia kredo ne plu signifas obstaklon por ricevi la burĝajn kaj politikajn rajtojn en Rumanio. Post tio en 1880 la agnosko de la rumania ŝtato fare de la internacia komunumo povis okazi. Sed la rumaniaj burokratoj ĉikanis la judojn, kiuj petis la rumanian ŝtatanecon, en tiu grado, ke ĝis la fino de la unua mondmilito nur ĉirkaŭ 200 de 270'000 judoj povis fariĝi rumaniaj ŝtatanoj, kio signifis, ke la judoj daŭre

¹¹ Pli detale vd. la kontribuojn de C. Schmidt pri Ruslando sub <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>, krome vd. F. Hirsch: *Empire of nations. Ethnographic knowledge & the making of the Soviet Union.* NY 2005; A. Kappeler: *Russland als Vielvölkerreich. Entstehung, Geschichte, Zerfall.* München 2001; U. Halbach: *Das sowjetische Vielvölkerimperium. Nationalitätenpolitik und nationale Fragen.* Mannheim 1992; G. Simon: *Nationalismus und Nationalitätenpolitik in der Sowjetunion. von der totalitären Diktatur zur nachstalinischen Gesellschaft.* Baden-Baden 1986.

¹² Liston de elmortantaj lingvoj en Ruslando vd. sub http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_endangered_languages_in_Russia.

restis senrajtaj kaj diskriminaciaj kunloĝantoj. Nur en 1919 la juro estis ŝanĝita en tiu senco, ke ĉiuj judoj loĝantaj en Rumanio kaj ne posedantaj alian civitanecan, aŭtomate ricevis la rumanian ŝtatanecan.

Post la unua mondmilito la etna pejzaĝo de Rumanio baze ŝanĝiĝis. Rumanio povis vastigi sian teritorion, tiel ke la lando fariĝis duoble pli granda. Per tio al la nova ŝtato (en kiu loĝis 16'045'300 homoj) aliĝis regionoj (kiel Transsilvanio, Banato, Bukovino kaj Besarabio), en kiuj la parto de etnaj minoritatoj estis konsiderinde granda, nome 28%, en Transsilvanio kaj Banato eĉ 40%, laŭ jena disdivido: rumanoj (71,9%), madjaroj (9,1%) germanoj (4,5%), judoj (4,9%), ukrainoj (3,1%), rusoj (1,1%), bulgaroj (2,2%), ciganoj (0,3%), turkoj kaj tataroj (1,4%), ceteraj (pli ol 1%). En Transsilvanio (5'549'806 loĝantoj) la disdivido de la etnoj estis jena: rumanoj (57,8%), madjaroj (24,4%) germanoj (9,8%), judoj (3,2%), ciganoj (2,0%), ceteraj (2,8%).

La Pariza Packonferenco de 1919/20 integris Rumanion per la traktato pri la protekto de malplimultoj de la 9a de decembro 1919 en la ĝeneralan eŭropan sistemon pri protektado de la minoritatoj, kiu estis garantiita de LdN. Sed la rumanoj ne entuziasmiĝis pri ĝi. La premo de LdN rilate la respektadon de la rajtoj de la etnaj minoritatoj karakterizis la postan malfacilan efektivigadon kaj praktikadon de tiu minoritat-protektajuro en Rumanio, kiu probable konsideris tiun juron kiel altrudon de ekstere. En la sekvo, la minoritata politiko de Rumanio forte dependis de la ŝanĝiĝanta evoluo de la interna politiko de tiu lando, kiu en la 20-30aj jaroj vidis fortan naciisman ondon flanke de la rumanoj, al kiu sekvis enorma influo flanke de la naci-socialisma Germanio en la 40aj jaroj. En 1923 estis akceptita nova (moderna, liberalisma) konstitucio, kiu anstataŭis la konstitucion de 1866 sed ne integris la decidojn pri la minoritata demando, kaj proklamis Rumanion kiel unuecan ŝtaton, kies oficiala lingvo estis la rumana. Ĉiuj civitanoj ricevis la samajn bazajn rajtojn. Kun la madjaroj la parlamentaj deputitoj de la transsilvaniaj germanoj voĉdonis kontraŭ la konstitucio de 1923. En 1938 reĝo Karolo II. enkondukis personan diktaturon surbaze de nova konstitucio, kiu traktis eĉ pli ŝpareme la aferojn de la minoritatoj. En 1940 li suspendis sian konstitucion, dissolvis la parlamenton kaj transdonis la gvidon de la lando al generalo Antonescu, kiu ekregadis ĝin pere de dekretoj. Estis tute klare, ke tiuj konstitucio implicis malavantaĝojn kaj diskriminaciojn por la etnaj minoritatoj, precipe la madjaroj, germanoj kaj, sub Antonescu, la judoj. Ekzemple per la enkonduko de lingvaj ekzamenoj por oficistoj en 1923 kaj instruistoj en 1925 amaso da madjaroj kaj germanoj estis maldungitaj. Se ili malsukcesis en tiuj ekzamenoj kaj ilia nombro reduktiĝis, lernejoj povis esti fermitaj. La instalado de ĝenerala komisario por minoritatoj ĉe la konsilio de ministroj en 1938 kaj la adopto de la fama „minoritata statuto“ devis teorie plibonigi la rajtojn de la lingvaj minoritatoj de Rumanio. Sed ĉar tiu statuto havis nur duagradan leĝan statuson kaj ĉar nur malmulaj efektive konis ĝin, tiu reguligaĵo kaŭzis malmultajn efikojn kaj praktikajn plibonigojn. Per la adopto de nova leĝaro en 1940, kies paraleloj aŭ parenceco kun la rasaj leĝoj de Nurembergo estis klare konstatablaj, precipe judoj estis eliminataj el postenoj de la ŝtata servo kaj el gvidaj funkcioj en la ekonomio kaj ankaŭ ne rajtis partopreni en sportaj aranĝoj. Malpermesita estis al ili la akirado de terposedo, la geedziĝo kun etnaj rumanoj kaj la posedo de radioaparatoj. En la sama jaro Rumanio devis adopti, surbaze de premo flanke de Germanio, dekretitan leĝon pri la formado de la germana popolgrupo en Rumanio, kiu devis ricevi privilegiitan statuson. La germanoj de Rumanio fariĝis objekto de la publika juro kun vastaj memadministrataj kompetencoj, ekzemple sur la kampo de la religia lerneja sistemo. Krom tio la germanoj rajtis fondi naci-socialisman partion (!), kvankam la ekzisto de politikaj partioj en Rumanio tiam estis malpermesita. La popolgrupa leĝo validis ĝis 1944. El la vidpunkto de la etnaj minoritatoj kaj popolgrupoj de Rumanio la evoluo de la aplikado de la minoritata juro en Rumanio, kiu unue ekzistis sub la impreso de la grandrumana ŝovinismo kaj poste de la germana naci-socialismo kaj antisemitismo, estis klare seniluziiga kaj negativa, kvankam la etnaj minoritatoj disponigis pri sufiĉaj eblecoj, okazoj kaj rimedoj por esprimi siajn vidpunktojn en la bukareŝta parlamento, kiuj plej ofte restis tamen sen praktikaj efikoj kaj rezultoj. La multnombraj plendoj pri leĝaj diskriminacioj, kiujn la etnaj minoritatoj de Rumanio, precipe la madjaroj, deponis en la intermilita tempo ĉe LdN, ekzemple koncerne la problemojn de la edusistemo, restis parte eĉ sukcesaj. La minoritata politiko de Rumanio kruele finiĝis per la sistema forpelado kaj murdado de judoj, ciganoj kaj religiaj sektoj dum la dua mondmilito sub la gvido de Ion Antonescu, kiu formas apartan ĉapitron de la historio de Rumanio, Moldavio (Iași), Bukovino kaj Besarabio (kun Transdnistrio), kie pereis inter 250'000 kaj 410'000 personoj, ĉefe judoj, kaj 25'000 ciganoj.¹³

¹³ La indikoj pri la ĝis nun traktitaj landoj estas ĉerpitaj el la koncernaj verkaĵoj publikigitaj sur <http://www.uni-koeln.de/jur-fak/ostrecht/minderheitenschutz>.

Jugoslavio:

Kompare kun la ĝis nun pritraktitaj kazoj, Jugoslavio sekvis post la unua mondmilito alian modelon, kiu konis alitipajn problemojn kaj devis respekti la specifaĵojn de la komplika etna situacio en la sudslavaj landoj sed ankaŭ la pezan historian-politikan-kulturan heredaĵon kaj probable ankaŭ la interesojn de la serba dinastio Karađorđević. Ĉar ĝi estas pli komplika (aŭ kompleksa), mi provos ĉi tie skizi nur la ĉefajn trajtojn de tiu jugoslavia ordo, situacio aŭ modelo. Ia konkreta jugoslavia politiko pri minoritatoj ankoraŭ ne ekzistis sed estis intime ligita kun la sekve priskribitaj cirkonstancoj, kiuj unue devis esti solvitaj. La „Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj“, do la unua jugoslavia ŝtato, komprenis sin kiel ŝtaton de unusola sudslava nacio, kiu ne baziĝas sur kolektivaj rajtoj sed sur individuaj liberecoj. Ĉi tiu koncepto kongruis kun la okcidenteŭropa ideo de la ŝtat-nacio, kiu ne difinis sin laŭ la lingva-kultura sed laŭ la histori-politika kriterio. Malgraŭ tio, tiu ŝtato ankoraŭ ne nomiĝis Jugoslavio, ĉar la serboj ne konsentis rezigni pri sia etnonimo en la oficiala nomo de la nova ŝtato. Sed baldaŭ la okcidenteŭropa ideo de la ŝtat-nacio kunpuŝiĝis kun la serbaj interesoj kaj la emancipiĝo de la ceteraj etnoj en la nova ŝtato. La kernon de la jugoslavia problemo formis la konflikto ĉirkaŭ la unua konstitucio, pli konkrete: inter centrismo kaj federismo, kio respegulis nenion alian ol la antagonismon inter la serba ideo de la ŝtat-centrismo kaj la kroata prefero de la nacia politiko, kiu estis pli favora al federismo, kiun naciismaj serboj kritikis kiel habsburgan anakronismon. Do, la serboj insistis pri la centrisma ŝtat-konstruo. La kroatoj kaj slovenoj kritikis, ke la reĝo Petar I. Karađorđević (1918-21), kiu mem estis serbo, prejudikis en la akto pri la fondo de la ŝtato de la 1a de decembro 1918 la monarkion, unitariismon kaj centrismon kaj tute ne konsideris federismajn opciojn. La 28an de junio 1921 (Tago de la Sankta Vito) la parlamento do voĉdonis per 53% kaj sen la ĉeesto de kroatoj, slovenoj kaj komunistoj por la nova konstitucio, kiu antaŭvidis la centrismon laŭ la moto „Unu reĝo, unu ŝtato, unu nacio“. La konstitucio estis konsiderata kiel akceptita, kvankam ĝi kontraŭis la kompromisan spiriton, kiu regis post la milito. La parlamentisma monarkio signifis kompromison de la progresemaj burĝaj intelektuloj kun la konservemaj tradiciistoj. Do, dekomence parto de la kroatoj estis seniluziigitaj, kaj la nova ŝtato suferis gravan problemon de legitimeco.

Por venki la internajn tensiojn oni propagandis la koncepton pri komuna jugoslava nacia kompreno. Kredante, ke la serboj, kroatoj kaj slovenoj estas nur „triboj“ de la sama popolo, oni celis krei unuecan nacian ŝtaton kun supera jugoslava, t.e. serb-kroat-slovena kulturo, simile kiel en Italio, kie venecianoj kaj napolanoj estis konsiderataj kiel italoj, aŭ kiel en Germanio, kie bavaroj kaj prusoj estis nomataj germanoj. Oni eĉ parolis pri la triunua popolo de la slovenoj, kroatoj kaj serboj. La filoj de la reĝo simbole ricevis la nomojn Petar, Tomislav kaj Andrej. Kiel oficialan lingvon de la SKS-ŝtato oni proklamis la „serb-kroatan-slovenan“, kvankam tia lingvo neniam ekzistis. La slovena lingvo formiĝis kiel memstara idiomo kaj unuafoje en la historio fariĝis oficiala lingvo, pri kio la slovenoj certe ĝojis kaj fieris. Koncerne la procentaĵojn de la etna aparteneco en la censo de 1918 estis kalkulitaj 39% serboj, 24% kroatoj kaj 8,5% slovenoj. La bosniaj muzulmanoj formis 6% kaj la makedonoj 5,3%, sed tiuj du etnoj ne estis akceptitaj kiel memstaraj „triboj“ kaj neniu pledis por ili kiam la ŝtato estis fondita. Muzulmanoj estis konsiderataj kiel religia aŭ kultura komunumo, montenegranoj kaj makedonoj kiel „duonhistoriaj“ entoj, kiuj ankoraŭ devis decidi, al kiu el la „historiaj“ ŝtatpopoloj ili volas aparteni. La makedonoj (4,87%), kiujn la serboj suspektis kiel teroristojn kaj kiuj devis unue emancipiĝi de sia bulgareco (la makedona lingvo estis konsiderata kiel serbigita bulgara dialekto kaj unue devis esti normigita), troviĝis en malfacila situacio. Ilia nacia problemo estis solvita nur sub Tito, ĉar fakte nur la komunistoj opiniis, ke tiuj popoloj posedas propran identecon kaj pledis por la rajtoj de ĉiuj jugoslaviaj popoloj je memstareco, inkluzive de bosnianoj, albanoj, montenegranoj kaj makedonoj, kaj ke ili ricevu propran respublikon. La albanoj (3,68%), kiujn la serboj konsideris kiel nefidindajn civitanojn, batalis kontraŭ sia aliĝo al Serbio kaj estis apogitaj de Albanio. En etna rilato, la serboj konsideris la albanojn de Kosovo kiel „albanigitajn serbojn“. Ili estis plej malbone traktataj en la SKS-ŝtato, kaj ilia situacio iomete pliboniĝis nur en la komunisma tempo. Restis la hungaroj en Vojvodino, kiuj estis reprezentitaj per ĉ. 4% kaj kiuj same spertis fortan premon flanke de Serbio. Ceteraj etnaj minoritatoj en la unua Jugoslavio estis la germanoj (4,27%), rumanoj (1,91%), aliaj slavo (1,45%), turkoj (1,4%), judoj (0,53%), italoj (0,11%), aliaj (0,67%). Ne malpli konsiderinda estis ankaŭ la signifo de la religia disdivido: 46,67% ortodoksoj (ĉefe serboj, montenegranoj kaj makedonoj), 39,29% katolikoj (ĉefe slovenoj kaj kroatoj), 11,22% islamanoj (ĉefe bosnianoj, albanoj kaj turkoj), 1,91% protestantoj (germano k.a.), 0,54% judoj. Entute en 1918 vivis en la SKS-ŝtato 12'017'323 loĝantoj.

En ŝtata renverso la reĝo Aleksandar I. Karađorđević enkondukis en 1929 diktaturan reĝimon kaj dume savis la ŝtaton per ŝanĝo de ĝia nomo al Jugoslavia Reĝlando. La teritorio estis reorganizita laŭ la modelo

de francaj departamentoj, kio signifis, ke la provincoj ricevis nomojn de riveroj. La etnaj kaj religiaj organizaĵoj estis malpermesitaj, la klopodoj firmigi la jugoslavan identecon estis forigitaj, dum la neetna bosniismo estis propagandata kiel unuiga ideo por la muzulmanoj (aŭ islamanoj) de Bosnio. Malgraŭ tio, sub la kreskanta impreso de la faŝismo unuflanke kaj komunismo aliflanke la vivo kaj la politiko en Jugoslavio rapide radikaliĝis kaj la homoj seniluziiĝis, tiel ke la jugoslavia eksperimento, kiu evidentiĝis ĥimero, finfine tragike fiaskis: En 1941 Jugoslavio aliĝis al la trilanda pakto de Germanio, Italio kaj Japanio, kio signifis ĝian okupadon fare de la „aksaj potencoj“. Kiel ŝtato Jugoslavio, kiu estis atakita de la germana armeo, de facto ĉesis ekzisti en aprilo 1941 (de iure ekzistis registaro en ekzilo en Londono, ĝis 1945). La judoj de Jugoslavio estis deportitaj kaj ekstermitaj de la nazioj kaj de la Ustaŝo-ŝtato (en Jasenovac kaj aliloke), la germana populgrupo de Jugoslavio estis persekutita, deportita kaj mortigita de la Tito-partizanoj, kaj la saman sorton travivis multaj kontraŭ-komunismaj slovenaj defendantoj (domobranci), kiuj estis amase ekzekutitaj de la jugoslavia armeo en 1945. Do, okazis pluraj genocidoj, pri kiuj postmilito oni ne parolis. Post la milito Jugoslavio estis refondita kaj rekonstruita surbaze de la Tito-komunismo, kiu rompita kun Moskvo kaj alproksimiĝis al la Okcidento, konsiderante sin blok-neŭtrala ŝtato. La kaŭzoj de la fiasko de la promesplena jugoslavia eksperimento estas multfacetaj. El la definitive elĉerpita komunisma Jugoslavio, pri kies konservado la naciaj elitoj ne plu estis interesataj, fine de la 1980aj jaroj kaj el sangaj militoj eliris unuopaj, *etne purigitaj*, politike ege arogantaj kaj ekonomie malriĉiĝintaj naciŝtatoj kun la nomoj Slovenio, Kroatio, Serbio, Bosnio-Hercegovino, Makedonio ktp., kiuj havas ĝis nun sufiĉe malbonajn rilatojn inter si, tiel ke en principo ili preferas ne plu 'tuŝi' unu la alian.¹⁴

Kiel Zamenhof opiniis pri la gentaj privilegioj kaj la problemoj de la disdivido de la tero inter pluraj gentoj, kiuj pretendas la saman terpecon, ni legu la sekvajn frazojn de Zamenhof en ties „Alvoko al la diplomatoj“:

„La nuna tempo ne estas simila al la tempo antikva: sur ĉiu disputebla peco da tero laboris kaj verŝis sian sangon ne unu gento, sed ankaŭ aliaj gentoj; kaj se vi decidis, ke tiu aŭ alia terpeco devas aparteni al tiu aŭ alia gento, vi ne sole ne faros agon justan, sed vi ankaŭ ne forigos sur tiu terpeco la kaŭzon de estonta batalado. La „liberigo“, kiun vi donos al tiu aŭ alia terpeco, estas nur sofismo, ĉar ĝi signifos nur, ke al tiu aŭ alia gento vi donos la rajton esti sur tiu terpeco mastroj super homoj de aliaj gentoj, kiuj ankaŭ tie naskiĝis, laboris kaj suferis kaj havas koncerne sian patrujon la samajn naturajn rajtojn, kiujn ĉiu infano havas koncerne sian patrinon. Estas vero, ke tiu gento, kiun vi privilegias, entuziasme krios: „Vivu la diplomatoj!“ kaj se tiu gento sur la koncerna terpeco prezentos la plimulton, ĝi per teroro silentigos la aliajn, kaj ĉiuj gazetoj en la mondo diros, ke 'la tuta loĝantaro de la terpeco A sentas sin tre feliĉa' ... Sed tio estas mensogo, simpla mensogo, kiun la mondo ne komprenos nur pro tio, ke la ĝemado de la terore silentigitaj prematoj, de homoj, kiuj en sia patrujo fariĝis 'fremduloj', ne venos al ĝiaj oreloj. Transdonante ian terpecon al la homoj de tiu aŭ alia gento, vi ĉiam faros maljustaĵon kontraŭ aliaj homoj, kiuj havas la samajn naturajn rajtojn koncerne tiun terpecon. La sola efektive justa decido, kiun vi povas fari, estas: laŭte proklami kiel oficialan, firme interkonsentitan kaj plene garantiitan decidon de ĉiuj eŭropaj regnoj, la sekvantan elemente naturan, sed ĝis nun bedaŭrinde ne observatan principon: Ĉiu lando morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj.“

Cetere, Zamenhof tute konsciis en la senco de la minoritataj rajtoj pri la neceso, ke al la gentaj, etnaj aŭ naciaj minoritatoj necesas garantii iliajn rajtojn, se li skribis, en la „Deklaracia de hilelito“ de 1906 (dogmo 6):

„(...) Konforme al la principo, ke unuj regnantoj, eĉ se ili prezentas en la lando grandegan plimulton, ne havas moralan rajton altrudi sian lingvon aŭ religion al la aliaj regnantoj, mi devas penadi, ke en mia lando ĉiu gento havu la rajton fondi por siaj membroj lernejojn kaj aliajn instituciojn kun sia lingvo kaj sia religio, se ili tion ĉi deziras, sed ke en ĉiuj publikaj institucioj, ne destinitaj sole por unu gento, regu nur lingvo neŭtrale-homa (...)“

¹⁴ Ĉe la indikoj pri la situacio en Jugoslavio mi baziĝis sur la libro de M.-J. Calic: Geschichte Jugoslawiens im 20. Jahrhundert. München 2010. Krome vd. L. Révész: Minderheitenschicksal in den Nachfolgestaaten der Donaumonarchie unter besonderer Berücksichtigung der magyarischen Minderheit. Wien 1990.

3. La kuriozaj ideoj kaj alternativaj proponoj de Zamenhof

Laŭ Zamenhof, la kaŭzo de „ia reciproka malamo inter la gentoj“ estas „krom la facile forigebla reciproka nekomprendado kaj nekonado – la ekzistado de gentoj premantaj kaj gentoj premataj, la blinda egoismo, fiereco kaj kalumniemeco de la unuaj, la natura reagemeco de la lastaj. Estas facile interfratigi homojn liberajn kaj egalrajtajn, sed estas nefareble interfratigi homojn, el kiuj unuj rigardas sin kiel rajtajn mastrojn super la aliaj.“

El jena konstato:

(...) „Se en la institucioj publikaj estas uzata unu sola regna aŭ loka lingvo, tio estas nur poroportuneca cedo de la malplimulto al la plimulto, sed ne humiliga tributo de gentoj mastrataj al gento mastranta. Ĉar la gentaj nomoj, kiujn portas ankoraŭ multaj regnoj kaj provincoj, estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la loĝantoj de unu supozata deveno rigardas sin kiel mastrojn super la loĝantoj de alia supozata deveno, ...

Zamenhof proponis, por solvi tiujn konfliktojn kaj dilemojn:

... tial ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale-geografian.“

„Se vi eĉ farus nenion alian, se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj (afero tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eraon en la historio de Eŭropo. Ĉar en lando kun neŭtrala nomo la tuta natura plena egalrajteco de ĉiuj ĝiaj loĝantoj pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, sed en lando kun nomo genta la egalrajteco neniam estos plena kaj daŭra, ĉar la malfeliĉa nomo ne sole kvazaŭ pravigos la plej malnoblajn intergentajn maljustaĵojn en la diversgentaj landoj de la orienta Eŭropo, sed eĉ en landoj pli civilizitaj ĝi ĉiam konfuzos la kapojn eĉ de la plej honestaj civitanoj, subtenante en ili ĉiam la opinion kaj senton, ke la lando apartenas nur al tiu gento, kies nomon ĝi portas, kaj ĉiuj aliaj gentoj estas en ĝi nur fremduloj. Eĉ ĉe la plej bona volo la civitanoj de tiu lando ne povas al kutimiĝi al la ideo, ke ili ĉiuj prezentas unu nacion, ĉar por tia nacio simple ne ekzistas vorto, kaj, demandite pri tio, al kiu popolo li apartenas, la loĝanto de tia lando pro manko de tiu vorto estas devigata nomi ian genton; kaj ĉi tiu devigata konstanta alkalkulado sin al ia speciala gento anstataŭ al la komuna nacio de la lando forte subtenas la gentan ŝovinismon kaj malpacon inter la samlandanoj.“

Kiel konate, en sia „Homaranismo“ de 1906, kies spirito nun revenis en la zamenhofan „Alvokon al la diplomatoj“ de 1914/15, la aŭtoro de Esperanto proponis la enkondukon de la termino „Varsovilando“ anstataŭ Pollando, „Peterburgio“ anstataŭ Ruslando, „Parizio“ anstataŭ Francio, ktp. Por kompari la tekstojn, mi ripetas la kvinan dogmon el la „Homaranismo“ de 1906:

„Mia patrujo mi nomas tiun regnon, en kiu mi naskiĝis aŭ en kiu mi por ĉiam enloĝiĝis. Tiu parto de la regno, en kiu mi pasigis mian infanecon, aŭ kiu estas loĝata precipe de mia gento, povas esti por mi pli kara, ol ĉiuj aliaj partoj; sed nomi mia patrujo unu pecon de mia aŭ tiom pli de fremda regno pro tio, ke tie pleje loĝas aŭ iam regis mia gento, mi neniam devas, ĉar tio ĉi ne sole kondukas al konstantaj disputoj, sed ĝi estus ankaŭ kontraŭa al la morala leĝo pri ia sengenteco de la tero. Se tiu parto de la patrujo, en kiu mi loĝas, laŭ sia geografia karaktero aŭ laŭ siaj moroj tro multe diferencas de la aliaj partoj, tiam por eviti malkompreniĝon - mi povas al la demando pri mia patrujo nomi aparte tiun parton de la regno, en kiu mi loĝas, sed mi devas tiam ĝin nomi mia patruja lando, por ke estu klare, ke mi rigardas ĝin ne kiel mian ekskluzivan patrujon, sed nur kiel parton de mia patrujo. Sed nek mian tutan patrujon, nek ĝiajn apartajn partojn mi devas nomi per la nomo de ia gento, sed mi devas ilin nomi nur per nomo neŭtrale-geografia, kiel estas farate en ĉiuj plej novaj regnoj; sed se mia regno aŭ lando ne havas ankoraŭ neŭtralan nomon, mi devas ĉiam – almenaŭ en parolado kun homaranoj – nomi mian regnon kaj landon per nomo homarana, kiu konsistas el la nomo de nia ĉefa urbo kun la aldono de la finaĵo 'io' por la tuta patrujo kaj 'lando' por la nomo de ĝia parto. . Ekzemploj: Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo; Peterburgio, Parizio; Alĝerlando, Varsovilando.“

Por Zamenhof grava demando por solvi estis kaj do restis la monopolisma sinteno de la gentoj, ĉar en la regado, subpremado kaj diskriminaciado de malgrandaj etnoj fare de pli grandaj etnoj li vidis la ĉefan kaŭzon por la intergentaj konfliktoj. Do, li proponis aŭ postulis la 'neŭtraliĝon' de la nomoj de la gentoj kaj landoj, ekzemple Alĝerlando aŭ Belgujo. Kiel konate, Svislando estis por Zamenhof modela kazo de neŭtrala landonomo, kvankam ankaŭ en tiu lando troviĝas potencialo por diversaj kvereloj kaj konfliktoj.¹⁵

Sed Zamenhof „*sciis tre bone, ke la malamo inter la gentoj ne malaperos subite, en unu tago, kian ajn aranĝon la diplomatoj fjarus.*“ De la diplomatoj li atendis nur, ke ili „*donu al ni la eblon tion fari.*“ Pri la kaŭzo de intergentaj milito kaj ĝia forigo li skribis en sia „Alvoko“:

„Kiam la supre dirita principo estos oficiale fiksita per garantiita decido de ĉiuj eŭropaj regnoj, tiam malaperos la ĉefa kaŭzo de militoj kaj de konstanta reciproka timado kaj senfina armiĝado, ĉar tiam oni jam neniam kaj nenie povos diri, ke 'la patrujo estas en danĝero'. Oni scias ja tre bone, ke la vortoj 'patrujo en danĝero' ne signifas, ke iu volas deŝiri parton de nia patrujo kaj ĵeti ĝin en la maron, aŭ ke iu volas rabi por si la havon de ĝiaj loĝantoj, sed plej ordinare tiuj vortoj signifas simple: 'Minacas danĝero, ke sur ia terpeco, kie ĝis nun mia gento estis mastro kaj aliaj homoj estis nur pli aŭ malpli tolerataj, morgaŭ eble alia gento fariĝos mastro kaj mia gento estos nur tolerata'. Kiam en la tuta Eŭropo regos politika justeco absoluta, t.e. natura, ĉie kaj por ĉiuj egala, kiam en ĉiu lando ĉiuj loĝantoj estos morale kaj materiale plene egalrajtaj, kiam la landoj ne portos plu gentajn nomojn, kiam la regna lingvo ne havos plu karakteron gente-ŝovinisman kaj humiligan kaj ne ekzistos plu gentoj-mastroj kaj gentoj-servantoj – tiam ne ekzistos plu kaŭzo por intergentaj militoj; tiam ĉiu homo povos sidi tute trankvile en sia natura, sole vera kaj sincere amata patrujo, li ne bezonos plu timi, ke iu povas 'forpreni' ĝin de li, kaj li ne bezonos revii pri forpreno de la patrujo de aliaj homoj.“

4. La unuiĝo de Eŭropo

Anstataŭ la gente-orientita naci-ŝtato, pri kiu li atendis nenion bonan, Zamenhof pledis por la transiro al la eŭropa unuiĝo. Pri tiu ĉi temo li skribis en sia „Alvoko“:

„Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn 'Unuigitajn Ŝtatojn de Eŭropo'. Sed se nun estas ankoraŭ tro frue por paroli pri tio, oni devas almenaŭ per oficiala kaj interkonsentita akcepto de la supre dirita principo forigi tiun grandegan malbonon, tiun senfinan fonton de konstantaj bataloj, kiun prezentas la identigado de lando kun gento.“

Kvankam en 1915 unuflanke ankoraŭ estis tro frue paroli pri la konkretigo de iuj Unuigitaj (aŭ Unuiĝintaj) Ŝtatoj de Eŭropo rilate al la estonteco, pri la ideo aliflanke parolis en pli fruaj tempoj jam aliaj adeptoj de la eŭropa unuiĝo kaj la pacifistoj, do la ideo ne estis nova, kiel estu montrate en la sekva alineo.

Kiel reago kontraŭ la premo de la Otomana Imperio unue *Georgo de Poděbrady*, reĝo de Bohemio, prezentis en 1464 planon de paca konfederacio de la kristana Eŭropo, poste *Maximilien de Béthune*, duko de Sully, proponis superan eŭropan ŝtatan strukturon (1662), kiu devis ampleksi tutan aron da ŝtatoj en okcidenta, norda, orienta kaj suda Eŭropo surbaze de mezepokaj ideoj kiel kristana religio kaj latina lingvo. En 1713 *Charles-Irénée Castel de Saint-Pierre* menciis la unuiĝon de Eŭropo en siaj „Memuaroj“ de 1713 por rehavigi la pacon al tiu kontinento. *William Penn* volis inkluzivi en tiu eŭropa unuiĝo ankaŭ Ruslandon kaj Turkion (1691-3). Ankaŭ la verko de *Immanuel Kant* „Al eterna paco“ (1795) povas esti aldonita al la listo de historiaj pledoj por la eŭropa unuiĝo, ĉar kiel kondiĉon por la monda paciĝo Kantio antaŭvidis federisman kuniĝon de respublikaj ŝtatoj. En 1831 la polo *Wojciech Jastrzębowski*, fondinto de la

¹⁵ Fakte, la evoluo de la „lingva problem“ en Svislando estis tre aktuala temo ĝis 1914 (kaj ankaŭ poste). Pri tio legu ekzemple: W. Seitz: Geschichte der politischen Gräben in der Schweiz. Zürich/Chur 2014. (Ĉi tiu libreto traktas la temon ankaŭ el la vidpunkto de la 'lingva problem'). Alia libro, kiu detale traktas la evoluon de la „lingva problem“ en Svislando antaŭ 1914, estas: Hans-Peter Müller: Die schweizerische Sprachenfrage vor 1914. Wiesbaden 1977.

ergonomio, prezentis en sia „Vizio de alianco de la eŭropaj nacioj“ projekton de unuiĝinta Eŭropo. Kiel prezidanto de la dua internacia packongreso la franca verkisto *Victor Hugo* postulis en 1849 la „Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo“. Hugo vidis la eŭropan federacion eĉ kiel unuan ŝtupon al tutmonda unuiĝo, se li skribis, ke „ĝi nomiĝos Eŭropo en la dudeka jarcento, kaj en sekvaj jarcentoj ... ĝi nomiĝos homaro“. Sendube, kiel modelo de tia eŭropa unuiĝo grave servis Usono. *George Washington* skribis al *Marqués de La Fayette*: „Jam laŭ la modelo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Usono estiĝos la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Cetere, en la 19a jarcento estis tuta vico de filozofoj kaj politikistoj, kiuj parolis pri la neceso starigi „Unuĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo“, ekzemple *Felix Markham*, *Giuseppe Mazzini*, *Varlo Cattaneo*, *Giuseppe Garibaldi*, *John Stuart Mill*, *Miĥail Bakunin* kaj en la erao de *Bismarck Julius Fröbel*, *Eduard Löwenthal* k.a. En 1871, la franca parlamento diskutis pri Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. *Zamenhof*, kiu probable konis tiujn ideojn kaj faktojn, ial tamen ne menciis ilin. Per la eksplodo de la unua mondmilito en 1914 la „pacifisma utopio“ estis konsiderata kiel fiaskinta (*Karl Holl*), kaj, kvazaŭ simbole, la franca socialisto *Jean Jaurès* estis mortigita de iu franca naciisto. Elstaran kontribuon pri la problemoj de la milito kaj la restarigo de la paco en Eŭropo lige kun la demando pri la reunuiĝo de la eŭropanoj finverkis en aprilo 1915 la judaŭstra pacisto (kaj esperantisto) *Alfred Hermann Fried* en „Eŭropa restarigo“. ¹⁶ En la 1920aj jaroj precipe *Richard Coudenhove-Kalergi* uzis la terminon de „Paneŭropo“, kaj kiel unua politika partio la *Germana Socialdemokratio* postulis dum sia kongreso en septembro 1925 la efektivigon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. En 1923 *Trockij* revis pri „sovetiaj Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo“. En 1929 la franca ĉefministro parolis en LdN pri la ekonomia utilo de eŭropa federacio, tiel ke ekonomikistoj kiel *John Maynard Keynes* subtenis tiun ĉi ideon. En 1930 la franca politikisto *Aristide Briand* publikigis „Memorandon pri la starigo de Eŭropa Federacia Unio“, sed la germana registaro rifuzis tian planon. Kaj pri la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo parolis, last but not least, *Winston Churchill* en sia fama zurika parolado de 1946. La – precipe ekonomia unuiĝo – de la okcidenteŭropaj landoj estis akcelata post la dua mondmilito, sed la politika eŭropa unuiĝo, kiu estis lanĉita en la 1950aj jaroj kiel nova pacprojekto por la eŭropa kontinento, povis esti fondita nur en 1997 (Eŭropa Komunumo) kaj plu evoluigita 2007 (Eŭropa Unio), post kiam la orienteŭropaj landoj liberiĝis de la sovetkomunisma jugo en 1989, kion ĉi la rusoj ĥodiaŭ evidente bedaŭras, ĉar tiu landaro servis al ili ne nur kiel kiel melkebla bovino sed ankaŭ kiel sekureca zono inter NATO kaj Ruslando, por forteni de si la malamegatan Okcidenton kiel eble plej malproksime.

Zamenhof finis sian „Alvokon al la diplomatoj“ per jenaj linioj:

„Sinjoroj diplomatoj! Post la terura eksterma milito, kiu starigis la homaron pli malalten ol la plej sovaĝaj bestoj. Eŭropo atendas de vi pacon. Ĝi atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sola konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru, memoru, memoru, ke la sola rimedo, por atingi tian pacon, estas: forigi unu fojon por ĉiam la ĉefan kaŭzon de la militoj, la barbaran restaĵon el la plej antikva antaŭcivilizacia tempo, la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj.“

Finaj rimarkoj:

La celo de ĉi tiu analizo de la *Zamenhofa „Alvoko al la diplomatoj“* de 1915 estis montri la kontraŭdirajn realaĵojn dum la ‘intermilita tempo’, kiujn *Zamenhof* ne povis antaŭvidi, kaj priskribi la evoluon de la situacio de la etnaj minoritatoj en kelkaj orienteŭropaj landoj kaj menciiti la ĉefajn ideojn kaj progamojn, kiuj devis garantiiti kaj protekti iliajn rajtojn. Do, grandparte temas pri la prezentado de rezultoj de la aktiveco de la diplomatoj kaj politikistoj, de kiuj *Zamenhof* postulis seriozan laboron.

Zamenhof, kiu forpasis en aprilo 1917 kaj kiu estis ‘infano’ de la 19a jarcento, kiu uzadis la terminojn ‘regno’ anstataŭ ‘ŝtato’ kaj ‘gento’ anstataŭ ‘etno’ aŭ ‘naci(ec)o’,¹⁷ kaj kiu apenaŭ povis imagi la monon post 1918, eble venis al konkludoj, kies premisoj fontis en ‘lia’, en la specifa situacio de la Ruslanda Imperio, kie li vivis, kaj en lia hebreeco aŭ judeco kaj pli frua cionisma idearo.¹⁸ La „homaranismaj“ kaj „esperantismaj“ ideoj, kiujn li proponis, tamen estis lia propra inventaĵo.

¹⁶ La germanlingvan tekston vd. sub http://reader.digitale-sammlungen.de/de/fs1/object/display/bsb11124817_00001.html.

¹⁷ Pri nacio, en sia „Hlelismo“ de 1906 *Zamenhof* skribis: „Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas“.

¹⁸ Vd. ankaŭ http://www.planlingvoj.ch/Zamenhof_judademando.pdf.

La ideo de Zamenhof pri la „neŭtraligo“ de la gentaj kaj landaj nomoj por eviti monopolisman (aŭ ŝovinisman) sintenon de la popoloj kaj atingi plenan justecon inter la gentoj estas sufiĉe kurioza. Sed la plimulto de la novaj ŝtatoj en orienta Eŭropo ne elektis „neŭtrale-geografiajn“ nomojn sed nomojn naciismajn kiel Pollando, Ruslando, Litovio ktp.

La diplomatoj, politikistoj kaj juristoj de la Parizaj pactraktatoj, kiuj kreis la postmilitan ordon en Eŭropo, opiniis, ke ne eblas doni al ĉiuj gentoj la saman rajton, nome ke ili povas havi propran ŝtaton. Por kompensi tiun mankon kaj eviti novan gentan ŝovinisman devis esti adoptita severa leĝaro pri protektado de etnaj minoritatoj. Kiel montrite supre, en Sovetunio oni solvis aŭ intencis solvi (ĉu sincere aŭ ne estas alia demando) la problemojn de la etnaj minoritatoj tiel, ke oni donis al ili formalan aŭtonomecon kadre de la ‘centrismo federacio’ sub la kontrolo de totalisma politika sistemo, kiu estas regata de unusola politika partio, kiu ekskludas la ekzistojn de ĉiuj aliaj partioj.

Tiel, la zamenhova ideo pri la „neŭtrale-geografiaj“ nomoj restis realecfremda. Kio tamen restis konservata de la originalaj ideoj de Zamenhof estis la „neŭtrala“ lingvo Esperanto, kiu eĉ ne estis menciita en lia „Alvoko al la diplomatoj“. La „homaranismon“ de Zamenhof la esperantistoj pli malpli forgesis, sed ĝiaj ideoj iusence plu vivis en la „esperantismo“ aŭ en la t.n. „interna ideo de Esperanto“, kiu propagandas la idealon de la amikeco inter la gentoj, etnoj kaj popoloj pere de „neŭtrala“ lingvo.

Kvankam Zamenhof ne estis politikisto, lia „Alvoko al la diplomatoj“ portas esence politikan karakteron. Lia averto aŭ admono al la diplomatoj, ke ili respektu sian „grandan moralan respondecon“, ke ili „zorgu, ke ilia laboro ne estu sencela kaj senfrukta“, eble estas la ĉefa merito de Zamenhof en sia „Alvoko al la diplomatoj“, kune kun lia pledo favore al la vizio pri Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, kiuj iusence elformiĝis nur post la dua mondmilito, same kiel la daŭra paco, pri kiu Zamenhof estis tiel skeptika kaj malfidema.

En aprilo 1939 Zamenhof estus atinginta sian 80an jariĝon. Okazintus granda festo je lia honoro. Estus interese scii kaj apenaŭ imageble, kion li estus dirinta kaj skribinta pri tia freneza Eŭropo, en kiu la demokratio radikale fiaskis kaj en kiu la agresemaj kaj militemaj fortoj venkis, en kiu la komunismo regis Ruslandon kaj la naciismo Germanion, inter kiuj troviĝis Pollando, kiu estis minacata de nova disdivido, aranĝita fare de siaj najbaroj, kaj de denova malapero de la geografia mapo. La nova milito inter la gentoj, kiun L.L. Zamenhof intuicie antaŭvidis kaj timis, reale eksplodis la 1an de septembro 1939. Novaĵo de tiu milito estis, ke la judoj estis amase ekstermataj per kugloj de pafiloj kaj venena gaso en la plej kruelaj koncentrejoj kaj mortigejoj, kiujn la homaro entute vidis. Ĉiujn tiujn terurajn spertojn li povis ŝpari al si, ĉar li forpasis jam en 1917.

© Andreas Künzli, M.A., majo 2015. La aŭtoro (nask. 1962) studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la zurika universitato (1983-91) kun diploma verkaĵo (lic.phil.) pri la temo „Esperanto kaj interlingvistiko en la Cara Imperio kaj Sovetunio“.